


1989 oktobro
82-a jaro
n-ro 1006 (10)

(aperas monate escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Cent jarojn post la apero,
La Esperantisto iras telekopie tra la mondo

Vi trovos

ke svarmo da raportoj trazumas ĉi tiun numeron. En la varmaj kaj fekundaj kondiĉoj de la jara kongres-sezono, ideoj ĝermis, elkreskis, kaj nun fine lanĉas sin amase en la mondon. Ĉiu anguleto, ĉiu klubo estas potenciala loĝloko: ĉu tie estas instruisto, ĉu esperantista familio, ĉu interesato pri kultura aŭ faka kunlaboro trans landlimoj? La ĉi-numeraj iniciatoj serĉas ĝuste tiajn homojn. Ili fakte forpelis plurajn rubrikojn, kiuj revenos post la svarmsezono; sed restis "Laste aperis", ĉar ankaŭ la libroj amasmigradas lastatempe.

Ne malpli svarmas la ideoj ĉe la estraro kaj oficejo. Spurojn de tio vi trovos en la raporto pri la estrarkunsido, pri kies longeco mi ne petas pardonon: nur dufoje jare aperas tia fenestro al la aktuala funkciado de nia gvidorgano. Ties novaj membroj jam instinkte akceptis saĝan laborprincipon. UEA ne ekzistas por monopoli tiujn svarmantajn ideojn, sed por trovi por ili taŭgan hejmon; ĝi kunlaboru en ebligo kaj sukcesigo de internaciaj projektoj, kiujn jam naskis la kunpensado de plej diversaj movadanoj. Sed por fari tion efike ĝi bezonas ties fidon kaj subtenon. Ambaŭ ni provos gajni kaj firmigi dum la venontaj tri jaroj. Ĉu vi pretas helpi? Ĉu la ideoj zumas nemastreble ĉe via fenestro? Turnu vin al paĝoj 178-179.

Enhavo

- 161 Estrara kunsido: Per kunlaboro stimuli kunlaboron (Mark Fettes)
- 164 Landa agado: "UEA forlasis nin."
Informado: Preskaŭ forgesita jubileo vekas mondiskalan atenton
- 166 Regiona agado: Vizitoj, subteno kaj propra iniciatemo verdigas Afrikon; Internaciaj aranĝoj: 62-a SAT-Kongreso: Mondaj ventoj refreŝigas la laboristan movadon; Postkongresoj al la 74-a UK: Turismo portas utilajn kontaktojn; 23-a ILEI-konferenco: Instruistoj pli vigle kaj intense kunlaboras; 1-a Terminologia Seminario de TEC: Akceptindo kiel ĉefa kriterio; Packonferenco de Unesko: Pri paco, sed ne pri lingvoj, en la homa menso; 3-a Internacia Literatura Forumo de LF-koop: Publike pri Privat; Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko '89: Ĉu la fervojistoj avangardos?; 3-a Konferenco de Balkanaj Esperantistoj: Kunlaboro de Adriatiko ĝis Istanbul
- 169 Pupteatro: Ĝojo en etaj dozoj (Z. Seleŝ)
- 170 25-a Infana Kongreseto: Estis tre interese, aŭdi ion pri alia lando
Edukado: Pontlingvo por talentaj lernantoj (Péter Rados)
- 171 Familioj: Post dek jaroj, alvenas nova generacio de denaskuloj (Csiszár Ernő); La Komisiono de UEA pri Generaciaj Problemoj
- 172 Landa agado: Orienta leciono pri entreprenemo (Mark Fettes)
- 174 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 175 Kongresa Komunikado de la 75-a Universala Kongreso en Havano
- 176 Honoraj Membroj: Rekono al kvar esperantologoj kaj instruistoj
Kvin novaj akademianoj
- 177 Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis aŭgusto 1990)
- 178 Membrokampanjo: Por dekmilo post tri jaroj (Mark Fettes)
Oficiala Informilo
- 179 Kotiztabelo de UEA por 1990
- 180 Esperanto en radio

La kovrilo

Modelon de la informagado provizis Roland Schnell (kovrilo, meze), per sia iniciato por festi la centjariĝon de la Esperanta gazetararo. Kunlabore kun la Centra Oficejo, kiu peris adresojn, kun la klubo de N. mberg, kiu gastigis la dissendon la 1-an de septembro, kaj kun trideko da aktivuloj ĉirkaŭ la mondo, Schnell sukcesis veki seriozan atenton en 15 landoj. Ke temas pri nur kvarono de tiuj en la Jarlibro ne ŝuldiĝas al li, sed precipe al la legantoj de ĉi tiuj paĝoj. Pri tio vidu liajn komentojn sur paĝoj 164-165.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 39; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam. Nederlando.

Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 380 7408.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 12999, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.

Per kunlaboro stimuli kunlaboron

Eble ĉi-foje ni komencu ĉe la fino. Sidante inter la oficistoj ĉe la kafotablo, du tagojn post la kunsido, nova estrarano Roman Dobrzyński vortumis sian impreson pri la pasinta semajnfino.

“Mi venis ĉi tien kun kelkaj timoj. Jam en Brajtono mi eldiris miajn dubojn pri la rilato inter la estraro kaj la oficejo. Ŝajnis al mi, ke la estraranoj estas nur kvazaŭ senpagaj oficistoj, kiuj pro sia distanco ne povas labori tiel efike kiel tiuj en la centro. Mi timis, ke la oficejo povas, se ĝi volas, amasigi ĉiun realan potencon ĉe si, tiel ke la estraranoj devas simple jesi ĝiajn decidojn. Tio estus aparta danĝero, se la prezidanto konsiderus sian postenon nur formalajo. ...

“Nun mi povas diri, ke mi spertis ion tute alian. Montriĝis, ke nia nova prezidanto alprenis sian taskon vere serioze. Krome mi trovis la oficistojn helpemaj kaj kunlaboremaj. Ŝajnas al mi, ke ekzistas bonaj eblecoj por ke la estraro plenumu sian gvidan funkcion – sed mi tamen substreku, ke nia informiteco dependas grandparte de vi. Ni devos vidi, kiel tio en la praktiko funkcias.”

La pozitiva impresoj de Dobrzyński estas respegulita en la pozitiva impresoj de la oficejo. Pluraj el la nova estraro trovis tempon por kunsidi kun la stabanoj, ekorientiĝi pri ilia labor-sistemo kaj eĉ iom manipuli la komputilajn registrojn. Sep el la naŭ estraranoj krome gastis ĉe diversaj oficistoj, samtempe ŝparante hotelkostojn kaj ebligante reciproke konatiĝon.

Serĉataj: kvindek komisiitoj

La estraro kunsidis, unuafoje en sia plena konsisto, inter vendreda tagmezo kaj dimanĉa tagmezo (22-24 septembro). Nekutime grandan parton de la tempo okupis ĝeneralaj diskutoj pri la diversaj fakoj kaj la maniero funkciigi ilin kaj la estraron mem. Rezultis, neeviteble, ioma malkonkreteco de la decidoj. Kompanse oni tamen venis al sufiĉe unueca bildo pri la farenda laboro.

La ĉefa demando estis ĝuste la eklaborigo de la nova teamo, en kiu sidas nur unu membro de la lasta. Montriĝis ke ĉiuj havas kelkajn ideojn pri sia fako, sed bezonas informiĝi pri multaj detaloj. Kio jam estas farita aŭ provita tiukampe? Kion rajtas estrarano memstare fari? Kion kapablas la oficejo? Kvankam la tagordero “centra oficejo” postulis nur kelkajn minutojn da trakto, ĝi daŭre revenis en aliaj partoj de la kunsido, ĉar oni konstatis ke la gvidaj aparatoj de UEA povas funkcii nur kunlabore. La oficistoj okupiĝas pri detaloj kaj amaso da rutinaj taskoj, ne havante tempon por multa strategia pensado. La estraranoj, male, estas ŝarĝitaj pri strategio sed por tio ofte bezonas detalajn sciojn kaj aldonan laborforton. Necesas do konstanta reciproka informado kaj interkonsultiĝo. Aparte se temas pri taskoj por la oficistoj, la direktoro de la Centra Oficejo havas ŝlosilan ligan rolon, kiel oni plurfoje emfazis dum la kunsido.

Por plivastigi la laborpovon de la estraro, oni dediĉis konsiderindan tempon al evoluigo de listo de “estraraj komisiitoj”, laŭ iama propono de la komitata

elektokomisiono. Estas ankoraŭ tro frue por raporti detale pri tio. Tamen ni notu, ke serĉataj estas i.a. fakuloj pri la Esperanta libromarkato, pri eldonado en la movado, pri diversaj aspektoj de la kongresa programo inkluzive artajn aranĝojn, teatron kaj klerigajn aranĝojn, pri kunlaboro inter la movadaj radio-stacioj, pri diversaj aspektoj de eksteraj rilatoj ktp. Tradiciajn agadojn kiel la delegitan reton, la Lingvan kaj Magnetofonan Servojn, la Semajnon de Internacia Amikeco ktp. oni celas reekzameni kaj laŭeble igi pli utilaj. Ĉiu komisiito respondecos al la tuta estraro pere de nomita estrarano. Komence de nova trijara mandato ili devas esti (re)nomitaj, sed ankaŭ iam ajn dum la daŭro de tiu mandato la estraro povas reekzameni ilian aktivecon kaj laŭbezone nomi aliajn.

Inter jam (re)konfirmitaj komisiitoj estas Humphrey Tonkin, kiel sekretario de nova Internacia Patrona Komitato de eminentaj subtenantoj de Esperanto, kiel la direktoro de CED (la Centro de Esploro kaj Dokumentado), kaj kiel respondeculo pri la Novjorka Oficejo. Christopher Fettes restas kiel Komisiito pri Infanaj Aferoj, Bruce Sherwood kiel sekretario pri Internacia Kongresa Universitato, Barbara Despiney kiel ĉef-representanto ĉe Unesko, Vilmos Benczik kiel prezidanto de la Belartaj Konkursoj, Elsbeth Bormann pri virina agado, Hans Bakker pri afrika agado, Ian Jackson pri regularoj, R. Llorens pri Koresponda Servo Mondskala, Renato Corsetti pri generaciaj problemoj. François Lo Jacomo transprenas la ĉefredaktadon de Esperanto-dokumentoj. Eventuale kelkaj aliaj jamaj komisiitoj daŭrigos en siaj postenoj. Pli kompleta listo aperos en la Jarlibro 1990, kiu laŭ speciala peto de la Estraro estas celata por dissendo fine de marto.

Membrokampanjo devos sanigi la financon

Koncerne membrojn UEA relative bone fartas, ĉar fine de septembro ĝi havis 110 individuajn membrojn pli ol samtempe en la antaŭa jaro, malgraŭ altigo de la kotizoj. Oni tamen venis al la konstato, ke tia stabileco ne sufiĉas. La prognozo por 1989 antaŭvidas negativan saldon en la spezokonto de ĉirkaŭ 100 000 guldenoj; la buĝeto por 1990 proponas relative optimisman minuson de 44 000 guldenoj. Post diskuto, la nova estraro





Prezidanto John Wells (fonetikisto, prezidanto de la Londona E-Klubo) konsultiĝas kun alia akademiano, ĝenerala direktoro Simo Milojević.

unuanime konsentis, ke varbado de novaj membroj prezentas la plej pozitivan solvon al tiu malekvilibro en la spezoj. La celojn de la oficejo, kiujn vi retrovos sur paĝoj 178-9, la estraranoj subtenis per pluraj konkretaj proponoj pri sia propra engaĝiĝo. Interalie oni persone kontaktos difinitajn celgrupojn, kaj instigos la ĉefdelegitojn kaj perantojn al aktiva partopreno en la varbado. Ankaŭ la landaj kaj fakaj asocioj estos petataj laŭeble kunlabori.

Lige kun membreco leviĝis la malnova demando, ĉu estus finance kaj administre eble eldoni la revuon *Esperanto* ankaŭ en orienta Eŭropo. La akceptado de kotizoj almenaŭ parte en "mola" (neŝanĝebla) valuto malfermus la membriĝon al tute nova grupo de esperantistoj, sed starigus al UEA aldonajn organizajn taskojn. Pluraj estraranoj trovas la politikan situacion senprecedence favora. Aliflanke, la ekonomio de orienta Eŭropo ne kuraĝigas tiajn paŝojn. Oni demandas sin, kiom da potencialaj abonantoj fakte ekzistas tie. Princz, kune kun la financa fako de la oficejo, esploros pri la ebleco malfermi tian membrokategorion en 1991.

Ekde 1990 la revuo *Esperanto* aperos en nova vesto. La redaktoro kaj oficejo ankoraŭ evoluigas la detalojn de nova formato, kovrililo kaj enpaĝiga skemo. Apud la Jarlibro aperos en 1990 ankaŭ nova "katalogeto" de la Libroservo, kiu donos apartan atenton al lastatempaj kaj UEA-eldonaĵoj. (Nova plena katalogo ne aperos antaŭ 1991.) TEJO daŭre strebos trovi monon por kvina kaj sesa numeroj de *Kontakto*, ĉar en 1990 same kiel en ĉi tiu jaro UEA rekte pagos nur kvar numerojn. Nova redaktoro por *Kontakto* estas nomota.

La estraro ricevis mandaton de la Komitato fari "detalan analizon" de la servoj kaj kostoj en UEA. Intertempe la financa fako de la oficejo laboras por disigi kelkajn ĉapitrojn de la buĝeto, cele al pli klara superrigardo de en- kaj elspezoj. Oni antaŭvidas ke la jarraporto pri 1989 jam prezentos plibonigon kompare kun la antaŭaj jaroj.

Renovigo sur ĉiuj kampoj

La Konstanta Kongresa Sekretario, Nikola Rašić, prezentis raporton pri sia unua jaro en la oficejo kaj faris plurajn rekomendojn por plibonigo de la kongresa administrado. La estraro reagis pozitive, aparte substrekante la bezonojn de pli uzablaj dokumentoj kaj pli bone preparita informado. La preparoj por Havano antaŭeniras kontentige (vidu

Kongresan Komunikon en ĉi tiu numero). Ĉar TEJO jam decidis kongresi en Koreio en 1994, la estraro esprimis fortan preferon, ke ankaŭ la tiujara UK okazu en orienta Azio.

Kiel ampleksigon de la turisma agado de UEA, oni antaŭvidas internacian ekskurson al Ĉinio en 1990 okaze de la 40-jariĝo de *El Popola Ĉinio*. La oficejo kaj koncerna komisiito ankaŭ faras planojn pri simila ekskurso al kelkaj afrikaj landoj. Ambaŭkaze oni donos kiel eble plej da subteno al la lokaj movadoj.

La situacio rilate la Centron Zamenhof en Bjalistoko estas ĝenerale esperiga, malgraŭ la retiriĝo de ĝia ĉefa patrono, Roman Malinowski, el la politika vivo post la formado de nova registaro en Pollando. Bjalistoka parlamentano J. Slezak dufoje partoprenis UK kaj forte pledis por Esperanto en sia elektokampanjo; la loka universitato kontraktis kun Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino pri

kunlaboro; ekde oktobro laboras en Bjalistoko plentempa direktoro de la Centro, Jarek Parzyszek, kiu post unu jaro disponas pri renovigita konstruaĵo kiel provizora sidejo. UEA daŭre kolektas donacojn celatajn al ekipado de la definitiva Centro, sed intertempe donos atenton ankaŭ al la nuna ekfunkcio de ĝiaj programoj kaj ilia ligiĝo kun la tutmonda movado.

Sur pluraj kampoj de la estrara agado oni frontas rekonstruon de la bazo. Tiel estas pri informado kaj kulturo, du terenoj neglektitaj de la lasta estraro: la novaj respondeculoj, respektive Durwael kaj Ŝtimec, komencos per kompilado de informoj pri jam ekzistantaj iniciatoj kaj rimedoj. Ambaŭ antaŭvidas kunvoki renkontiĝojn de aktivuloj en kaj ekster la kongresoj. Durwael jam proksime kunlaboras kun la informa fako en la oficejo, kiu cetere planas gastigi renkontiĝon de la gvidantoj de eŭropaj Esperanto-centroj kunlabore kun Ŝtimec.

Sur aliaj terenoj temas pri evoluigo de ekzistantaj projektoj. Lins celos igi pli celtrafaj la eksterajn rilatojn kaj precipe kunordigi iniciatojn de la landaj kaj fakaj asocioj, ekzemple en okcidenta Eŭropo. Li krome estas estrarano de CED, kies revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* ekde 1990 estos kompostata en la Centra Oficejo kaj aperos ĉe la lingvistika eldonejo Benjamins en Amsterdamo. Kiel parto de tiu tereno, Lins donos apartan atenton al plibonigo de la Biblioteko Hodler.



Princz transprenis la jam faritajn esplorojn de sia antaŭulo J.-L. Texier pri la agado de la landaj asocioj; ankaŭ li vidas sian ĉefan taskon la stimulo de kunlaboro inter jam ekzistantaj organizaĵoj. Dobrzyński ligos pli proksimajn kontaktojn kun la

Oskár Princz
(klerigisto-
bibliotekisto,
sekretario
kaj oficeja
direktoro de
Hungara
E-Asocio)



Roman Dobrzyński
(televida ĵurnalista
kaj reĝisoro,
prezidanto de
Pola E-Asocio)





Maldekstre: So Gilsu (ekonomikisto, ILEI-reprezentanto en Koreio) transprenas la strategion en Azio. **Meze, supre:** Oficeja direktoro Neil Salvesen ŝajne direktas amikan admonon al Jan Koszmaluk (studento pri internacia juro, TEJO-prezidanto). **Meze, malsupre:** Ulrich Lins (historiisto kaj sekciestro pri akademiaj interŝanĝoj, estrarano de CED) donas intervjuon al Xue Meixian de Radio Pekino, kiu volontulas kelkajn monatojn en la CO. **Dekstre:** Osmo Buller (kultursekretario en nordfinna komunumo) trovis ke malmulto ŝanĝiĝis en lia iama laborejo (li estis CO-direktoro en 1986-87).

aktivuloj en Suda kaj Centra Ameriko (kien li ofte vojaĝas), Afriko kaj la arabaj landoj. Koncerne edukadon, la estraro kontente lasas ĝin sub la kompetenta kaj ĉiam pli aktiva prizorgo de ILEI.

So heredis de sia antaŭulo Y. Umeda ambician projekton pri Azia Edukejo en Ŝanhajo, Ĉinio. La estraro konstatis, ke la elspezoj antaŭviditaj por tiu projekto estas tro grandaj kompare kun la disponebla mono kaj la atendataj rezultoj. Krome, la instruista kurso, kiun oni konceptis kiel bazon por pli internacia trejnejo, estas malfondita. So do frontas la malfacilan taskon, reiri al la landaj asocioj en orienta Azio kaj evoluigi malpli ambician proponon. Jam okaze de la Azia Konferenco pri Esperanto-Instruado, kiun gastigos de la 6-a ĝis la 11-a de novembro la ĉina urbo Nanning, So esperas utile informiĝi pri

jam ekzistantaj iniciatoj en Ĉinio. Li ankaŭ donos apartan atenton al la pli malgrandaj movadoj en Vjetnamio, Tajlando, Nepalo, Bharato ktp.

Grandiozan impeton al la azia agado donis dum la lasta jaro Joachim Werdin, juna pola Cseh-instruisto kiu de dek monatoj instruas, prelegas kaj kontaktas aktivulojn en diversaj aziaj landoj. La efiko aparte videblas en Singapuro, kie subite ekestis landa asocio kaj deko da individuaj membroj de UEA. Rekone al tiu tre pozitiva kontribuo, la estraro decidis denove subvencii Werdin (kiu lastatempe estis en Malajzio, Aŭstralio kaj Tajlando) el la Fondaĵo Azio.

* * *

**Spomenka Štimec (Esperanta
administranto ĉe Internacia
Kultura Servo, Zagrebo)**



**Grégoire Maertens (emerita
funkciulo ĉe la belga
Ministerio pri Financo,
prezidanto de Insti-
tucio Hodler '68)**

**Ivo Durwael
(instruisto,
prezidanto
de Flandra
E-Ligo)**

Temas pri eventuale la lasta fojo dum ĉi tiu mandato, ke la estraro trairas tiom ampleksan tagordon. Ĉiuj ĝiaj anoj

konscias, ke plimulton de la laboro oni devas fari hejme: al la kunsidoj oni portu nur la plej grandajn aŭ plej problemajn demandojn. Interkunside necesas daŭraj kontaktoj, aparte tiuj kun la oficejo. La sekva kunsido, de la 23-a ĝis la 25-a de februaro 1990 en Roterdamo, donos okazon por kontroli la efikecon de tiu laborsistemo kaj la glatecon de la komunikado. Jam tiam devus cetere videbli la komencaj signoj de progreso. Kaj ni esperas povi raporti, ke la kunlaboro daŭras same bone kaj produktive kiel ĝi komenciĝis en septembro.

Mark Fettes

“UEA forlasis nin.”

Kvarope ni sidis ĉirkaŭ la tablo, en pala lampolumo, dum ekstere friskis printempa, senluma nokto. La urbon kovris tenebro.

“Ĉu vere ne estas troa danĝero, ke vi interparolas kun mi?” mi demandis.

“Ni ĝojas renkonti samideanon,” diris la juna instruisto. “Ekde pasinta majo neniu eksterlandano nin vizitis.”

“Vi eĉ povus verki artikolon pri nia situacio,” aldonis la maljuna muzikisto, veterano de la movado. “Por ni mem estus tro danĝere.”

“Ĉar ni ja diris al vi ĉion,” konkludis lia filino. “La monda movado ŝajne forgesis, ke ankaŭ ni situas en Eŭropo. UEA forlasis nin.”

Kion ili rakontis al mi pri sia lando, Rumanio, estus nepre aldonenda ĉapitro al *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins. Ĉar se ekzistas lando en Eŭropo, kie oni ankoraŭ persekutas Esperanton, tiu estas Rumanio. Kompreneble, nek la konstitucio nek iu ajn leĝo ĝin eksplicite malpermesas. Sed ĉu necesas aparta malpermeso, se en lernejoj oni akuzas ĝin kiel “danĝeran religian sekton” aŭ “internacian spionan organizaĵon”?

Komence de la 80-aj jaroj, *Esperanto* ankoraŭ raportis pri esperigaj eventoj en Rumanio. 1983 tamen montriĝis turnopunkta, nigra jaro: de tiam ne plu aperas eldonaĵoj pri aŭ en Esperanto, la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko kaj la florintaj kluboj, laŭjure ne ĉesigitaj, fariĝas malplenaj nomoj; kunvenoj reduktiĝas al kelkpersonaj privataj renkontiĝoj; la kvanto de aboneblaj revuoj kaj entute de iel haveblaj Esperantolegaĵoj ŝrumpas tendence al nulo. Eĉ malfreŝa *Bulgara esperantisto* aŭ kontrabandita *El Popola Ĉinio* kaŭzas ĝojon – pri *Hungara vivo* aŭ pri *Esperanto* eblas nur revii. UEA-delegito scias pri sia delegiteco nur malrekte, el privata letero, ĉar la Jarlibro jam de pluraj jaroj ne povas lin atingi.

La sinteno de la aŭtoritatoj ĉiam pliduriĝas, precipe ekde montara Esperanto-kunveno dum la Jubilea Jaro. Tiam ili ŝajne bonorde toleris la kunfestadon de ĉ. 50 diversetnaj samideanoj, kiuj eĉ fiksas memortabulon de Zamenhof sur rokon – jen kion raportis ĉeestintaj hungaraj gastoj. Sed la tagon post ilia forveturo aperis “oficialaj scivoluloj”, kiuj deprenis la tabulon kaj praktike dispelis la ĉeestantaron. Post reveno al iliaj hejmoj, plurajn el ili pridemandis agentoj de la sekurec-servo “Securitate”, kies evidenta celo estis fortimigi de similaj kunvenoj en la estonteco. Je tio ili sukcesis (jam la montaran kunvenon malvizitis la eksterlande plej konataj movadaj eminentuloj), sed la mikro-solidarecon de la samideanaro ili ne povas rompi. Kiam nia instruista amiko veturas al alia urbo, ĉar tie la provizado de laktajoj estas iom pli bona (jen kiel zorgas la rumana registaro pri la libertempo de siaj civitanoj), li ne forgesas viziti pli aĝan esperantiston, kiu, krom la malofta ŝanco praktiki la lingvon, havigas al li kelkajn legaĵojn, hazarde-aventure trafintajn en Rumanion. (Ĉe enveturo en la landon okazas detala priserĉado de la vojaĝantoj, dum kiu Esperantaj libroj povas esti forprenataj – kvankam la ekzamenado celas unuavice hungarajn publicaĵojn.)

Propagandi Esperanton ne plu eblas, varbi por ĝia lernado postulas individuan kuraĝon, ĉar tia agado povas veki ne nur mokadon kaj ĉikanojn de la propra medio, sed ankaŭ scivolemon de “Securitate”. Malgraŭ tio restas aktivuloj, kiuj sukcesas entuziasmigi por aniĝo en kvazaŭ preterleĝe organizitaj kursoj, kvankam Esperanto nun en Rumanio kunportas malgrandan praktikan utiligeblecon kaj relative grandajn riskojn por siaj

parolantoj. Veturi eksterlanden rumana civitano rajtas nur unufoje en du jaroj – se li posedas certan kvanton da valuto kaj se oni liveras al li pasporton. Kompreneble, alilanda Esperantorenkontiĝo ne estas bona bazo por elvetur-peto. Tial por la rumana samideanoj restas la ebloj, akcepti gastojn el eksterlando kaj korespondi. Sed: krom tio, ke ĉiu kontakto kun eksterlandano povas veki suspektojn kaj kaŭzi malagrablaĵojn, ankaŭ tranoktigo de gasto ne eblas laŭleĝe – la “kulpantoj” riskas grandan monpunon. Leteroj kaj sendaĵoj povas perdiĝi survoje en ambaŭ direktoj, kvankam poŝtaĵoj el okcidentaj landoj havas pli da ŝanco alveni al la adresito, ol tiuj precipe el Hungario. Rumana amiko skribis:

“La plej agraba agado por ni estis korespondado. Mankas al ni vortoj por konigi niajn sentojn, kiam ni ricevis leterojn el la tuta mondo. Bedaŭrinde la potenculoj volas preni de ni ankaŭ ĉi tiun ĝojon. Multajn leterojn, kiujn ni sendis, ili retenas, kaj tiamaniere niaj korespondantoj kredas, ke ni ne skribis, eĉ se niaj leteroj verŝajne ne forlasis la landon. Ankaŭ ĉiuj viaj leteroj estas legitaj de aliaj homoj antaŭ ol ni legas ilin.” (Kompreneble, tiu ĉi letero sendiĝis ne poŝte.)

INFORMADO

Preskaŭ forgesita jubileo vekas mondiskalan atenton

Pli ol 30 lokoj en 15 landoj partoprenis rekte en telefaksa ricevo de *La Esperantisto*, la 1-an de septembro 1989, honore al la 100-a datreveno de ĝia ekapero. La iniciaton, pri kiu vi povis legi sur p.62 de la aprila numero, elpensis kaj evoluigis laborgrupo en okcidenta Berlino (Roland Schnell, Lu Wunsch-Rolshoven). Per tiu eluzo de nekutima gazetara datreveno ili donis unikan ŝancon al lokaj aktivuloj, kapti relative facile la atenton de la landaj kaj internaciaj amaskomunikiloj.

La Esperanto-klubo en Nürnberg, FR Germanio, kie unue aperis *La Esperantisto*, bonvolis kunlabori kun la projekto, tiel ke la “telekopioj”, dissenditaj pere de Noris Datentechnik, venis rekte el la naskiĝurbo de la Esperanta gazetaro. Kopioj iris i.a. al Usono, Kanado, Brazilo, Meksikio, Sudafriko kaj Tajlando (kie Joachim Werdin pasigis kelkajn semajnojn kadre de sia azia vojaĝo). En pluraj landoj, kiel Belgio kaj Britio, oni utiligis la datrevenon eĉ sen ricevi telekopion. La tuta eŝo do verŝajne ampleksis ducenton da gazetoj.

Organizanto Roland Schnell komentas interalie jene:

“Estas bedaŭrinda fakto, ke la plej multaj landaj asocioj tute ne komprenis la signifon de ĉi tiu projekto. Aparta letero [al ili]... kaŭzis nur du rektajn reagojn. Kvankam ili ricevis pretan tekston por gazetara informilo, kiu enhavis ĉiujn necesajn informojn pri la sukceso kaj la celo, ili faris nenion. Modele kunlaboris Ueli Haenni el Svislando, kiu tuj iris al la administracio de la nacia poŝto, tie demandis pri kunlaboro, tradukis la gazetaran informon en sian nacian lingvon kaj dissendis ĝin aldonante la necesajn lokajn detalojn. Du grandaj gazetoj de la

Por senditaj pakajoj, se ili atingas la celiton, tiu devas pagi signifan dogankoston. Tiaj helpaĵoj tamen tre gravas, ĉar en Rumanio preskaŭ ĉio mankas. Aktuale haveblas, per kuponoj, unu kilogramo da sukero, po duonkilogramo da viando kaj da faruno, kvin ovoĵoj monate. Post longa vicado oni ne ĉiam akiras panon kaj lakton. Kafo, cigaredoj, kosmetikaĵoj aŭ dolĉaĵoj funkcias kvazaŭ valute, eĉ certaj medikamentoj subaĉeteblas nur pere de ili. La konstanta manko de varoj ankaŭ estas rimedo de la reĝimo por fortenti homojn de politika agado, koncentri ilian atenton tutsimple al la bezonoj de pluvivado. Eble eĉ feliĉe, ke tiel ne restas multa tempo al ili por legi ĵurnalojn aŭ televidi, ĉar ĉiuj komunikiloj plenas je glorado de la reganta partio kaj ĉefe de ties adorataj geestroj, k-doj Nicolae kaj Elena Ceaușescu.

Oni ne povas ne miri, ke en tiaj fikondiĉoj tamen restas en multaj sufiĉe da idealismo kaj energio por persisti je la esperantisma idealo. Por niaj rumanaj samideanoj Esperanto ne estas, kiel por nia plejparto, nobla hobbio, sed fenestro – malvasta – al la mondo, konsolilo; okazo por engaĝiĝo kaj entrepreno de riskoj. Kune kun milionoj da rumanoj, hungaroj, germanoj, serboj kaj alietnaj civitanoj de la buntpopola Rumanio, ankaŭ pli ol tri mil esperantistoj atendas la tagon, kiam la limoj – geografiaj kaj aliaj – malfermiĝos. Sed ni, esperantoj, ankaŭ ĝis tiu tago ne rajtas forgesi, ke Rumanio situas en Eŭropo.

(nomo de la verkinto konata al la redaktisto)

En aprilo ĉi-jare, UEA sendis oficialan protestleteron al Unuigintaj Nacioj pri la situacio de la esperantistoj en Rumanio. Ĝi prezentis similajn faktojn, kiel tiuj en la supra artikolo, kaj konkludis jene:

“Devas esti evidente, ke la rajto al informoj kaj ideoj, la rajto libere partopreni en la kultura vivo kaj komuniki trans landlimojn, inkluzivas la rajton lerni kaj uzi lingvon laŭelekte. La parolantoj de Esperanto, kies interesojn protektas neniu ŝtato aŭ etna grupo, ofte submetiĝis al diversgrada persekutado. Tiaj persekutoj atencas la homan dignon kaj la liberon de la individuo....

“UEA, nome de siaj pli ol 45 000 membroj en pli ol 100 landoj, alvokas la registaron de la Socialisma Respubliko Rumanio nuligi la limigojn je importado de Esperantaj eldonaĵoj, ĉesigi la timigadon de esperantistaj individuoj kaj grupoj, kaj permesi la okazigon de publikaj kursoj kaj kunvenoj kaj la eldonadon de Esperantaj materialoj, konforme kun siaj devoj laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la dokumentoj, kiujn ĝi subskribis kadre de la Helsinkaj intertraktoj. UEA denove emfazas, ke tiaj aktivaĵoj okazis – foje kun registara subteno – dum multaj periodoj en la historio de Rumanio, kaj ke minimume du ĝis tri mil esperantistoj nun loĝas en la lando. UEA plue alvokas la rumanan registaron publike anonci sian politikon rilate al la lernado kaj utiligo de Esperanto.”

Ni bedaŭras aldoni, ke ĝis nun ni ne scias pri iaj sekvoj al tiu letero.

mf



svisa ĉefurbo Bern jam la 1-an de septembro raportis pri la telekopia dissendo kaj menciis Esperanton en tre favora maniero. Eĉ la svisa nacia novaĵagentejo transprenis mallongan tekston la saman tagon.

“La ekzemplo el Svislando pravigas la tezon, ke amas-komunikiloj volonte informas pri Esperanto, se la informo estas serioze prezentata. ... Ne estis necese speciale atentigi, ke ĉie en la mondo troviĝas Esperanto-parolantoj, ĉar tio estas pruvita de la fakto, ke mondscale oni atendis la telekopiojn. ... [La projekto] estis iu speco de eksperimento kaj pro manko de tempo ne en ĉiuj eroj estis kontentiga. Ĝi montris, ke malgranda grupo de celkonsciaj esperantistoj povas vekti la intereson de la nacia kaj internacia gazetaro. La internacia kunordigo postulis entute la laboron de du aŭ tri tagoj por prepari kaj dissendi la informojn kaj por klarigi la teknikajn detalojn surloke. Aldoniĝas la laboro

Maldekstre: Okaze de la centjariĝo de la unua E-gazeto, la Esperanto-grupo de la Kulturdomo “Villa Kreuzberg” en okcidenta Berlino aranĝis ekspozicion de Esperantaj periodaĵoj.

de la unuopaj naciaj informantoj, kiu egalas al unu aŭ du labortagoj en ĉiu lando.

“Ankoraŭ alvenas mendoj, ĉefe de Ĉinio. ... Kiu ankaŭ deziras ricevi (perpoŝte) la kompletan numeron 1 de *La Esperantisto* povas ĝiri tri guldenojn al la konto faxx-c ĉe UEA kaj sendi sian adreson al Laborgrupo FAX, Roland Schnell, Möckernstr. 71, D-1000 Berlin (tel. +4930 786 1885).”

Ĉu mankas al vi materialoj por publika prezento?

Nun haveblas la

INTERNACIA EKSPOZICIO DE UEA

Ĉi-momente la Ekspozicio uzeblas en du formoj:

- 35 koloraj paneloj, 60 x 85 cm;
- kompleto de 36 lumbildoj (prezo: 84 gld.)

Pruntante la panelojn aŭ aĉetante la lumbildojn, vi ricevas krome detalan gvidlibron.

Turnu vin al la Direktoro de la Centra Oficejo por pliaj informoj.

Vizitoj, subteno kaj propra iniciatemo verdigas Afrikon

Ni ŝuldas al niaj legantoj superrigardeton pri la agado en Afriko, kiu dum la pasinta jaro iĝis ĉiam pli vigla. UEA-komisiito Hans Bakker kompreneble restas centra kunordiganto, instiganto kaj inspiranto. Notindas, tamen, ke lia strategio “eduki la edukontojn”, kune kun kreskanta partopreno de eŭropanoj en la subtenagado, rezultigas pli kaj pli da memstareco por la lokaj movadoj. Ni ne dubas, ke multe pli okazas en Afriko ol ni povas raporti ĉi tie.

Benino: TCHIKPE Privas, kiu de pluraj jaroj aktivas en Cotonou, starigis fine de aprilo studgrupon kun kvin aliaj el la plej talentaj kaj laboremaj esperantistoj. La grupo kunvenas tri horojn ĉiusabate, kaj ĉio okazas en Esperanto; post spertiĝo de ĝiaj membroj, ili disiĝos por fondi kursojn kaj klubojn aliloke, kreante la kernon de funkcia asocio.

En majo vizitis la landon Elisabeth SCHWARZER, kiu staĝis en Niĝerio dum unu jaro, kun niĝerianoj Henry OGUINYE kaj Charles EZEINGAYA. Ankaŭ togolandano Foley EKUE pasigis semajnfino en la benina ĉefurbo, kaj li, Tchikpe kaj SOSSA Giles havis utilan diskuton pri kunlaboro inter la du najbaraj landoj.

Kamerunio: Jam aperis ĉi-jare almenaŭ du numeroj de revuo, kiun eldonas Duala Esperanto-Grupo sub la nomo *KEA-magazino*. Evidentiĝas forta sendependemo flanke de la redakcio, kiu akuzas la eŭropajn esperantistojn pri nesufiĉa konsultiĝo kun la afrika movado kaj parolas pri la neceso el-konstrui lokan financan bazon. Tiu emfazo estas tre bonvena, kaj ni esperas ke la kamerunia movado trovos vojon al organiziĝo laŭ tiuj principoj.

Tanzanio: La situacio de konsiderinda nombro de la tanzaniaj esperantistoj estas aparte malfacila, ĉar temas pri rifuĝintoj el la najbaraj landoj, kiuj vivas en rifuĝtendaroj kaj ofte spertas mistrakton de la tanzania registaro. Tri spertaj esperantistoj el la rifuĝejoj sukcesis elmigri al Kanado dum la pasinta jaro. Aliaj ankoraŭ suferas severajn problemojn en la lando.

Malgraŭ tio, la kontaktoj inter Tanzanio kaj la sveda movado daŭre plifortiĝas. Ekaperis nova informilo, *Orienta stelo*, kiun fincas svedaj kluboj sed redaktas esperantistoj el Tabora Esperanto-Federacio en la okcidenta parto de Tanzanio. La movado tie, ĉiam vigla, ricevis aldonan impulson pro la januara vizito de Feliks MALINOWSKI (vidu la julian-aŭgustan numeron, p.138). De 1990 ĝi havos du delegitojn: Mramba SIMBA (Bunda) kaj Muhindo KARAFULI (Tabora). Entute kvin tanzaniaj kluboj nun havas ĝemelajn klubojn en Svedio. Kunordiganto Anita Dagmarsdotter ankaŭ kolektas abonojn por *Orienta stelo*: Mariehamnsgatan 18, S-164 79 Kista, Svedio.

Togolando: E. Schwarzer, H. Oguinye kaj C. Ezebingaya vizitis plurajn urbojn kadre de sia maja vojaĝo, kaj estis imponitaj de la nivelo de la landa movado. En Lomé ili renkontis membrojn de du el la kvin ĉefurbaj kluboj; en Aneho, Zowla, Glidji, Zalivé kaj Aklakou ili vizitis aliajn esperantistojn kaj plurajn lernejojn, kie okazas E-kursoj.

Komence de aŭgusto 1989, la redaktoro de *Franca esperantisto* Hervé GONIN vizitis Lomé kaj pasigis plurajn tagojn kun la esperantistoj. Li kunportis studmaterialojn, revuojn,

legolibrojn kaj kasedojn, kaj interŝanĝis kun la pli progresintaj klubanoj spertojn pri instruado, kluba agado kaj varbado. F. Ekue kaj IRÉNÉE Hova akompanis lin tra la ĉefurbo. Gonin notis, ke “ĉiuj togolandanoj entuziasme kaj danke parolas pri la konstanta kaj multflanka helpo donita de Hans Bakker, kaj dankas la francan asocion pro la sendita materialo. Multaj korespondantoj estas dezirataj de tiuj entuziasmaj junuloj, kiuj miras, ke en Francujo ili ĝenerale trovas malmultajn korespondantojn, kvankam tie ne ekzistas financaj problemoj por akiri poŝtmarkojn!”

Zairio: Preskaŭ kvardek homoj ĉeestis la jarkunvenon de Esperanto-Instituto de Zairio, kiu okazis meze de aprilo en Lukala. EIZ-prezidanto NGANGU Nduantoni-Bakidila estis reelektita por nova trijara periodo. Sekve de aŭskultado de la jarraporto de la estraro kaj diskutado en kvar grupoj, la kunveno akceptis novan laborplanon kiu i.a. emfazas la gravecon de kunlaboro inter afrikaj landaj asocioj kaj inter Afriko kaj Eŭropo. EIZ cetere festis sian 25-jariĝon en majo. Du semajnojn pli frue, la prezidanto prelegis en la universitato de Lukala.

ADRESOJ:

Zamenhof Esperanto-Grupo de Owerri, c/o Henry O. Oguinye, PO Box 99, Owerri, Imo State, Niĝerio

Tabora Esperanto-Federacio (Orienta stelo), SLP 1727, Tabora, Tanzanio

Duala Esperanto-Grupo (KEA-magazino), BP 7407, Douala Bassa, Kamerunio

Por adresoj en Benino, Togolando kaj Zairio, vidu la Jarlibron.

INTERNACIAJ ARANĜOJ

62-a SAT-Kongreso:

Mondaj ventoj refreŝigas la laboristan movadon

Kun 260 partoprenantoj el 31 landoj, la ĉi-jara kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, inter la 5-a kaj la 12-a de aŭgusto en la bavara urbo Illertissen, estis aparte kaj esperige tutmondeca. Ĉeestis homoj el ĉiuj kontinentoj. La restarigita Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), kies antaŭa versio rompis rilatojn kun SAT en la jaro 1929, sendis estraranon A. Gonĉarov por saluti la kongreson kaj esprimi kunlaborem. Entute do SAT ŝajnas stari sur la sojlo de nova periodo.

Tiun impreson fortigis la paralela junulara renkontiĝo, kies trideko da partoprenantoj stimulis (re)starigon de SAT-“frakcioj” pri ekologia, sennaciista, sindikata kaj nov-komunisma agado. La kongresa gvidrezolucio alvokas al fortigo de la landaj laboristaj asocioj kaj repreno de la eldona agado de SAT.

Kadre de la programo okazis naŭ fakaj prelegoj, kaj i.a. Ulrich Lins, aŭtoro de *La danĝera lingvo*, parolis krome antaŭ germanlingva publiko. Al la kultura programo unuafoje aldoniĝis rokkoncerto, apud pli klasika muziko, teatraĵoj kaj aliaj eroj. Malsame kiel en la Universala Kongreso, eblis partopreni ĉiun aranĝon, kio kontribuis al la kunlabora etoso.

La 63-a SAT-kongreso okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1990 en Linz, Aŭstrio. Aliĝilo haveblas de Max Hollinger, Guberstr. 65, A-4020 Linz.

laŭ informoj en la septembra numero de *Sennaciulo*



Maldekstre:
Postkongresanoj en
Kimrio, kun la urbestro
de Abercomwy, meze.

Postkongresoj al la 74-a UK:

Turismo portas utilajn kontaktojn

Kvindeko da personoj el dek du landoj partoprenis la postkongreson en kimra marborda urbo Llandudno. En la programo troviĝis promenoj, aŭtobusaj kaj fervojaj ekskursoj, kaj vizito al la Kimra Nacia Kulturfesto (Ejstedsfodo). Profesiaj harpisto kaj iluziisto distris la anojn. Okazis ankaŭ renkontiĝo kun la loka urbestro kaj kun la urbestro de apuda urbeto Conwy.

Dum vizito al la kulturfesto, deko da postkongresanoj vizitis la budon de la Societo por la Kimra Lingvo por reciproka informado.

La irlanda postkongreso estis kredeble la plej internacia Esperanto-aranĝo kiu iam okazis sur la insulo, kun 42 homoj el Britio, Francio, Germanio, Islando, Israelo, Japanio, Meksikio, Nederlando, Norvegio kaj Svedio. Estis aranĝitaj ekskursoj tra la ĉefurbo Dublino, en pluraj orientaj kaj sudorientaj graflandoj kaj sur la riveroj Barrow kaj Suir. La kongresanoj ĉeestis brilan vesperon de tradicia dancado kaj muziko en la sidejo de la nacia Ligo de Muzikistoj.

En gazetara konferenco en Dublino partoprenis eksministrio pri edukado kaj reprezentanto de la Eksterlanda Ministerio. Samokaze ĵurnalistino Máire Mullarney lanĉis sian novan libro *Esperanto For Hope* ("Esperanto por espero"), kiu rapide disvendiĝas pere de la centra librovendejo de Dublino.

laŭ raportoj de Hilary Chapman (Kimrio)
kaj Garvan Makaj' (Irlando)

23-a ILEI-konferenco:

Instruistoj pli vigle kaj intense kunlaboras

La semajnon post la Universala Kongreso en Brajtono, 75 homoj el 19 landoj kunvenis en la kimra urbo Caerleon por diskuti

motivociele. Krome oni dediĉis multan atenton al la agado de ILEI, por kiu eĉ ne sufiĉis la disponebla tempo. Nur unu estrarano ne povis ĉeesti la konferencon. ILEI i.a. esploras la kondiĉojn por aliĝo al UEA, starigas fondaĵon memore al sia prezidinto István Szerdahelyi el kiu oni financos diversajn aktivaĵojn, lanĉas apartan eldonan fakon, kaj disvastigas la Internaciajn Ekzamenojn (al kiuj ĝi planas baldaŭ aldoni novan Superan nivelon). Ankaŭ pri aliaj aferoj okazas evoluo, ekzemple projekto de baza Esperanto-vortaro, kolektado de informoj pri korespondaj kursoj, kaj rilatoj kun movadaj kaj nemovadaj organizaĵoj. Estis akceptita nova ILEI-sekcio en Bulgario.

Dum la semajno okazis prelegoj kaj diskutoj pri plej diversaj aspektoj de la Esperanta instruado, projekciado de du filmoj en Esperanto, distraĵ vesperoj kaj tuttaga ekskurso. Audrey Childs-Mee gvidis seminarion pri la Cseh-instruado, kiun sukcese trapasis Carla De Lorenzi (Italio). Pro sia elstara instrulaboro en Irano, prof. d-ro M.H. Saheb-Zamani estis elektita honora membro de ILEI.

La 24-a ILEI-Konferenco okazos inter la 22-a kaj la 29-a de julio 1990 en Hanabanilla, Kubo, kun la temo: "Naciaj trajtoj en la instruado kaj lernado de Esperanto". La ĉefa respondeculo estas Malcolm Jones (Britio).

el gazetara komuniko de ILEI

Jen rilata informo, kiu maltrafis pli fruajn numerojn:

Pli ol 40 instruistoj el kvin landoj partoprenis la 7-an Internacian Metodikan Seminarion, kiun organizis en la lasta semajno de aprilo la Kleriga Centro de Slovaka Esperanto-Asocio en Poprad. Per 17 prelegoj, du praktikaj prezentoj kaj multaj viglaj diskutoj, oni traktis plej diversajn aspektojn de la lingvopedagogio. La 8-a IMS okazos en Kaunas, Litovio (Sovet-unio), plej verŝajne en aprilo 1990, kun jenaj temoj: psikologiaj faktoroj en fremdlingva instruado, enlingva interfero en Esperanto, kaj la rolo de lernolibroj kaj aliaj instruhelpiloj.

Kontaktadreso por ILEI troviĝas en la Jarlibro, kaj la adreso de ĝia prezidanto Edward Symoens estas presita en la revua kolofono.

Akceptindo kiel ĉefa kriterio

La unikan signifon de la unua terminologia seminario de TEC, kiu okazis en Poprad, Slovakio, meze de junio, substrekis la aktiva partopreno de Klaus Schubert (DLT), Regina Thaller (TermNet), kaj precipe la ĉeflektoro Edmund Brent, profesia terminologo ĉe ŝtata instanco en Kebekio, Kanado. En pensigaj kaj viglaj diskutoj partoprenis 19 homoj el naŭ landoj.

D-ro Brent alportis nekutiman trejnmétodon, nomatan “perproblema lernado”. Du grupoj de gelernantoj elektis subtemon el la fakoj kemio kaj informadiko, kaj sisteme pritraktis ĝian nociaron dum kvar posttagmezoj. La studentoj devis kvazaŭ “mendi” de la lektoroj informojn, ekzercojn, eĉ prelegojn pri temoj, kiuj helpus klarigi la renkontitajn problemojn kaj alporti solvojn. Estis ne nur permesate sed eĉ dezirate, ke oni intervenu per demandoj kaj por defendi la proprajn opiniojn. Inter la traktitaj temoj troviĝis “Ambiguo – difino kaj solvoj”, “Dokumentado en terminologio”, “Terminologiaj principoj”, “Terminologia normigado” kaj “Akceptigo de terminaroj”. Precipe ĉe la lasta temo evidentiĝis la profunda kaj ampleksa teoria scio kaj praktika sperto de la ĉeflektoro. La plurdimensia taskaro de akceptigo devas komenciĝi per detalaj esploroj pri la bezonoj de la uzantoj, kaj povas finiĝi nur post definitiva stabiliĝo de la ŝanĝoj ĉe la uzantoj. (Pri “akceptindo” kiel ĉefa kriterio en Esperanto oni ĝis nun ne multe cerbumis.)

Specialan dankon pro la sukceso de la aranĝo meritas Slovakia Esperanto-Asocio, kies sekretario Milan Zvara kaj ĉefinstruisto Anton Zacharias dum dek tagoj zorgis pri la bezonoj de la partoprenantoj.

el gazetara komuniko de TEC

Unesko-konferenco pri paco:

Pri paco en la homa menso – sed ne pri lingvoj

En Yamoussokro, Ebura Bordo, okazis de la 26-a de junio ĝis la 1-a de junio internacia konferenco pri la temo “paco en la menso de la homoj”. La vortoj aludas al la statuto de Unesko, kiu fiksas la starigon de tiu paco kiel ĉefan celon de la organizaĵo.

La kongreson partoprenis pli ol 200 delegitoj, el kiuj kvindek estis spertuloj pri la temo kaj la aliaj estis observantoj kaj reprezentantoj de diversaj internaciaj kaj eurbordaj organizaĵoj. Dank’ al subvencio de UEA mi povis ĉeesti dum kvar tagoj. La kongreso diskutis tri ĉeftemojn: La paco inter la homoj, La paco en la kunteksto de la rilatoj inter la homo kaj la medio, kaj La iloj de la paco. Pri ĉiu temo unu el la spertuloj prezentis dokumenton, kiun sekvis diskuto. Ĉiuj kongresaj laboroj disvolviĝis en du lingvoj, la franca kaj la angla.

La kongreso estis tre bone organizita, ĉar grandaj financaj rimedoj estis uzitaj. Sed rilate Esperanton mi devas diri, ke mi seniluziiĝis, ĉar oni parolis nek pri lingvoj, nek pri komunikado, nek pri Esperanto. Malgraŭ tio, mi kontaktis dekon da delegitoj kun kiuj mi parolis pri Esperanto, inter ili la ambasadoroj de FR Germanio kaj Ĉilio, germana ĵurnalisto, ekspertoj el Nigerio kaj Jugoslavio, politikisto el Benino, tradukisto de Unesko kaj eburianoj el diversaj rondoj. Inter tiuj personoj nur kelkaj aŭdis pri Esperanto, dum neniuj ĝin parolis. Mi vere miris ke en tia rondo la internacia lingvo ne estas konata.

Tamen, la kontaktoj ne estis tute senutilaj, ĉar per ili mi povos ekhavi utilajn rilatojn. Mi kore dankas al UEA, ĝia

estraro kaj ĝenerala direktoro, kiuj konfidis al mi reprezenti nian movadon en tia internacia kongreso.

SEKA Hyacinthe (Ebura Bordo)

3-a Internacia Literatura Forumo:

Publike pri Privat

Preskaŭ okdek partoprenantoj el dek kvin landoj aŭskultis kaj debatis la prelegojn de fakuloj pri la temo “La fenomeno Edmond Privat”, en la lanĉo de la Jaro de Privat. Temas pri la 8-a Internacia Literatura Forumo de LF-koop, komune organizita kun Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) en La Chaux-de-Fonds, Svislando, de la 14-a ĝis la 19-a de aŭgusto.

La centa datreveno de la naskiĝo de nia “ambasadoro de Esperanto” estis honorita ankaŭ per la inaŭguro de kvaretaĝa ekspozicio en la Urba Biblioteko. Ĝin prizorgis la stabo de la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), sub la gvido de Claude Gacond.

Prelegis en la forumo Tomasz Chmielik (EP [Edmond Privat], la amiko de Pollando), Eugène de Zilah (EP, la orientalist), Bonnie Fonseca (EP, la preleginto en Usono), Giorgio Silfer (EP, la ideologo de Esperantio), Herbert Mayer (EP, la stilisto), Perla Martinelli (EP, la poeto), François Degoul (EP, la majstro de interpopola konduto) kaj Claude Gacond (EP, la homo kaj la kvakero). La prelegoj aperos plejparte en *Literatura foiro*.

La tutsemajnan programon kompletigis brilaj recitaloj de Nikolin’ kaj de Jan Skorupski, premiero de la unua aŭtenta muzika vidbendo en Esperanto (“Kiam Parizo estis Parizo ankaŭ por ni esperantistoj”, interpretita de Nikolin’), ekskursoj kaj bankedo. Inter la fakaj kunvenoj ni mencias tiujn de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT), de OSIEK, de la legantoj de *La Gazeto*, kaj de la legantoj de *Literatura foiro*.

La 9-a ILF okazos en Bouresse (Francio) de la 5-a ĝis la 8-a de majo 1990 kaj estos dediĉita al la verkaro de Gaston Waringhien.

el gazetara komuniko de LF-koop

Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko ’89:

Ĉu la fervojistoj avangardos?

La ĉi-jara SAEST, aranĝo kun jam notinda historio, elektis la temon “trafiko” honore al la 150-jariĝo de la ĉefaj fervojoj. En Strážnice, Ĉeĥoslovakio kunvenis de la 7-a ĝis la 9-a de julio kvindek da fakuloj el dek landoj, por ampleksa programo de 16 prelegoj kiu donis apartan atenton ĝuste al la fervojo.

La plej vigla diskuto rilatis al fervoja terminologio. Ĉeestis reprezentantoj de la Terminologia Centro de UEA (Wera Blanke) kaj la Terminologia Komisiono de IFEF (L. Sekereš, J. David), kvankam ties gvidanto Gernot Ritterspach forestis. Sekve al la apero de Esperanta suplemento al la oficiala 6-lingva leksikono de UIC, oni jam diskutas pri la ebleco de fervoja difinvortaro. Leviĝas la demando, ĉu ne eblus utiligi la spertojn de la IFEF-komisiono kaj la plej progresintajn eksciojn de la ekstermovada terminologia laboro por ellabori sisteman unulingvan fervojan vortaron en Esperanto.

La loka Esperanto-klubo ĉe kulturdomo Strážničan agrable surprizis la seminarianojn, preparinte altnivelan kulturan programon inkluzive de folkloraj dancoj kaj kantoj, subĉiela muzeo kaj vingustumado. La prelegkolekto el la seminario estas mendebla ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-11001 Praha 1; ĝia antaŭvidita prezo estas ĉ. 18 guldenoj.

adaptita laŭ Petr Chrdle (CS) kaj Wera Blanke (GDR)

Kunlaboro de Adriatiko ĝis Istanbulo

Fine de septembro pli ol 400 partoprenantoj el Bulgario, Grekio kaj Jugoslavio kunvenis en la sudjugoslavia urbo Ohrid. El la aliaj balkanaj landoj – Albanio, Rumanio kaj Turkio – venis artikoloj, leteroj kaj telegramoj. Skriba saluto venis ankaŭ de UEA, el la plumo de Spomenka Štimec, nova estraranino pri kulturo.

La Konferenco prenis kiel temon “Kontribuo de la Esperanto-movado al kunlaboro de la balkanaj landoj en la sferoj de kulturo kaj turismo”, sed okazis ankaŭ pluraj fakaj kaj aliaj kunvenoj: i.a. de tradukantoj, redaktoroj, verkantoj kaj fervojistoj. En la vespera programo Bulgara Esperanto-Teatro prezentis “Lanĉo”, premiitan teatraĵon de Emilija Lapenna, kiu ankaŭ ĉeestis la Konferencon.

Fine de la Konferenco estis akceptita rezolucio, kiu interalie “konstatas, ke malgraŭ la diverseco de la politikaj, sociaj kaj ekonomiaj sistemoj de unuopaj balkanaj landoj, oni povas profundigi la kunlaboron inter ili sur ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj sferoj, precipe en tiuj de kulturo kaj turismo; substrekas la neceson plifortikigi la pacon kaj sekurecon sur la Balkana Duoninsulo kaj konstante entrepreni paŝojn por la protekto de la naturo; memorigas pri la lingva diverseco en Balkanio, kiu certgrade malhelpas la disvolvon de pli intensa reciproka kunlaboro, kaj pro tio proponas la utiligadon de Esperanto kiel la plej konvena neŭtrala komprenilo en ĉiuj sferoj de la interbalkana kunlaboro.” La rezolucio alvokas por pli intensa instruado de Esperanto en la baza eduksisistemo, kaj por ĝia lernado fare de “ĉiuj homoj de bona volo”.

La sekva konferenco okazos post du jaroj, probable en Istanbulo. Intertempe la komunan laboron kunordigas Jugoslavia Esperanto-Ligo.

laŭ raporto de F. Ero

Ĝojo en etaj dozoj (sed ĉiam malpli en Esperanto)

De la 25-a ĝis la 31-a de aŭgusto 1989 okazis en Zagrebo la 22-a Pupteatra Internacia Festivalo, denove alportante al la urbo la belon kaj ĝojon de pupteatra arto. El 22 prezentaĵoj nur kvarono okazis en Esperanto, sed ĉiuj estis sufiĉe kvalitaj – same kiel preskaŭ ĉiuj aliaj, en lingvoj de Jugoslavio (slovena, kroatserba) kaj ankaŭ en la angla, franca, nederlanda, rusa kaj blankrusa, itala, germana kaj, eĉ, hebrea. Videblas ke, bedaŭrinde, Esperanto ĉiam malpli estas lingvo de PIF, kiu komencis sian vivon ĝuste dank’ al esperantistoj kaj ilia deziro utiligi Esperanton profesie kaj evoluigi internaciajn kulturajn kontaktojn.

Tamen, kiel rimarkis unu el la organizantoj el Internacia Kultura Servo, al multaj pupistoj helpus eĉ rapida kurso laŭ la zagreba metodo. Sed por ke pupistoj tion ekdeziru, ankaŭ la Esperanto-parolanta publiko devus esti pli multenombra kaj pli vigla. Se oni povus aŭdi ĉiupaŝe en la teatrejoj nur Esperanton, verŝajne ankaŭ kurso sukcesus.


Sed ni revenu al la ĝojo de ludo. Arto, kiu al spektantoj aspektis ludo, ĝojigis kaj infanojn kaj plenkreskulojn. Ĝuste inter la prezentaĵoj en Esperanto estis iuj kiuj tion faris plej bone. La internacia infana ĵurio kiel plej bonajn elektis la prezentaĵojn “Fabelo pri la maldekstra ansero” de Junulara Teatro Novi Sad el Jugoslavio (nacilingva) kaj “La urseto Puh”, kiun en Esperanto prezentis Roza Nikolova kaj Miroslav Cvetanov el Bulgario. Ludemo kaj multe da simpatio fluis inter la aktoroj kaj rigardantoj, kaj grandan ĝojon vekis inter infanoj la simpatia urseto Puh kaj ĝiaj gekameradoj (vidu foton).

La internacia faka ĵurio decidis pri kvin premioj por specialaj kvalitoj de iuj prezentaĵoj. Speciala premio por kompleta koncepto kaj realigo de la prezentaĵo estis aljuĝita al “Sinjoro Saltpilko” de Pupteatro Otto van der Mieden el Nederlando

(nederlandlingva), kaj la ĉefpremion oni atribuis al Pupteatro “Radost” (Ĝojo) el Brno (Ĉeĥoslovakio) por la prezentaĵo “La teatraĵo pri Dorota”. La sama pupteatro gajnis la premion pro kvalita Esperanta traduko de scenteksto, kaj la premion por la bona kolektiva sceneja lingvaĵo dividis Ŝtata Pupteatro “Banjaluka” el Bielsko Biala (Pollando) kaj Familia Pupteatro Nikolova-Cvetanov. Tiel PIF, kun Puh kaj Dorota kaj multaj aliaj nekonataj kaj nenomitaj, navigas plu tra monda jardeko por kultura evoluigo.

Z. Seleš

Maldekstre: Legintoj de Winnie-la-Pu facile rekonos, inter la pupetoj de “La urseto Pu”, siajn amikojn Ia, Kanga, Ruo, Strigo, Pu, Porketo kaj Kuniklo.



Estis tre interese, aŭdi ion pri alia lando

Tridek tri infanoj el 15 landoj kaj kvar kontinentoj renkontiĝis dum semajno en bela kaj komforta lernejo proksime de la marbordo. Knaboj kaj knabinoj loĝis en apartaj domoj. Ili rapide amikiĝis kaj baldaŭ infanoj, helpantoj kaj gvidantoj fariĝis granda familio. (bj*)

Sabate vespere oni dividis la infanoj al grupoj, entute ses. Iliaj nomoj estis: meloj, sciuroj, lutroj, kunikloj, fokoj, strigoj. Unue oni diris sian nomon kaj ĉu oni havas gefratojn, el kiu lando oni venas ktp. (gf)

Dianĉon ni komencis kun nia horaro. Je la oka ni matenmanĝis. Je la 9-a, ni iris al la halo kaj tie ni faris aĵojn en niaj grupoj. Ni faris marionetojn, bestetojn, ni skribis kaj ni aktoris. Je la 10-a kaj kvarono ni kantis. Poste ni ludis interne aŭ en la sporthalo, aŭ ni naĝis. Je la 13-a ni tagmanĝis. Je la 14-a ni ekskursis. (dwk)

A jes, pri manĝoj! La manĝaĵo estis bona, tamen mi rimarkis ke ĝi perfektigis dum la semajno de "lerneja" ĝis "esperanta" nivelo. Estis eĉ speciala manĝo por vegetaranoj. Por la ĉiam soifanta infanaro trinkaĵoj estis ofte pretigitaj.

Ĉiutage okazis io eksterordinara: vizito al la interesa ludil-muzeo en Rottingdean, ekskurso al la UK kie ni kantis kaj muzikis, gaja veturado kun la malnova trajno "Bluebell" kun vizito al la signalejo kaj posta pikniko. (bj)

Venis al ni du televido por filmi nin. Ni vidis poste nin vespere en la programo. Vizitis nin japana sinjorino, Kimie Markarian kun du aliaj japanaj sinjorinoj, kiuj montris al ni kiel



Interne kaj ekstere, regis gaja etoso en la Kongreseto. Juna pola kinost

uzi sorobanon (japanan mankalkulilon). Al mi tio tre plaĉis, kaj poste ĉiu infano ricevis po unu sorobanon. Proksime ni estis de la maro, sed nur unufoje ni banis nin en ĝi. Al mi tio estis granda travivaĵo. Foje ni lernis anglan popoldancon sub gvidado de s-ro Ibbotson. (mb)

Je la 18-a ni vespermanĝis. Estis homo kiu nomiĝas Zemek kiu filmis nin, kaj je la 19-a ni vidis kion li filmis dum la tago. Vendredon ni prezentis koncerton por la gepatroj. Mi ludis fluton kaj mi aktoris. Kaj tiam, sabaton mi flugis hejmen. (dwk)

Mi trovis novan leteramikon el Pollando, kun kiu mi tre ofte parolis pri problemoj. Estis tre interese, aŭdi ion pri alia lando....

EDUKADO

Pontlingvo por talentaj lernantoj

Okaze de sia lanĉo de hungarlingva libro pri la familio Polgár, kies tri fratinoj pasintjare gajnis la virinan Ŝak-Olimpikon por Hungario, Hungara Esperanto-Asocio aranĝis gazetaran konferencon. Apartan intereson inter la sesdeko da partoprenantaj ĵurnalistoj vekis anonco pri la Fondaĵo Talento. Tiun fondaĵon establis la Ekonomikista Grupo de HEA, por organizi kaj financi klason de baza lernejo en la apud-Budapeŝta urbeto Budaörs, kie oni instruos surbaze de la pedagogia koncepto de László Polgár.

La ĉefaj gazetoj de Hungario, kune kun la provinca gazetaro, vaste informis pri la projekto. La Hungara Televido kaj Radio faris plurajn elsendojn. Plej detale kaj objektivaj raportis Magyar Nemzet, unu el la plej popularaj gazetoj de Hungario: "Kio estas bezonata por sukcesigi la edukadon de geniuloj? Interalie tio, ke en la infano estu maksimuma ambicio, la pedagogo starigu antaŭ ĝi maksimumajn pretendojn kaj donu al ĝi maksimuman helpon, kaj admiru ĝin."

La kunlaborantoj de la estonta klaso parolas pli modeste pri "la edukado de talentuloj". Ili resumas jene la tri kondiĉojn laŭ la pedagogiaj principoj de László Polgár: ke oni sufiĉe frue komencu okupiĝi pri la infano, ke tiu agado estu intensa, kaj ke

ĝi koncernu relative malmulte da kampoj. Tiucele ili elektis du terenojn: la lingvojn kaj la matematikon.

La infanoj antaŭtagmeze lernos kvar horojn hungare, poste ili ripozos kaj sportos. Posttagmeze ili lernos tri horojn, sed jam en fremda lingvo helpe de denaska parolanto. La unua fremda lingvo por tiu klaso estos Esperanto, kiu krome estos la komuna lingvo por la instruistoj (kiuj sekve devos esti esperantistoj). En la dua jaro la infanoj lernos la anglan lingvon, pri la sekva ankoraŭ ne naskiĝis decido sed temos pri la rusa, germana, franca, eble hispana kaj itala.

La kunlaborantoj de la Fondaĵo Talento nun serĉas denaskajn parolantojn de tiuj lingvoj (kompreneble, nur esperantistojn), kiuj pretus partopreni en la laboro surloke. Interesiĝantoj skribu al la adreso: Fondaĵo Talento, A. Lukács, Pf. 50, H-2041 Budaörs, Hungario.

Péter Rados (Hungario)

Denove haveblas la esperantologia ĉefverko

Lingvo kaj vivo

de Gaston Waringhien.

Unua eldono (Stafeto, 1957): 36,00 gld.

Dua eldono, korektita kaj bindita
(Jubilea Kolekto de UEA, 1989): 48,00 gld.



okaptis la tuton sur vidbendo, kiu post redaktado fariĝos libroserva varo.

Bedaŭrinde, ke ankaŭ la plej bona kongreso devas finiĝi. Sed mi esperas, ke mi revidos la aliajn infanojn dum la Kongresetoj de la venontaj jaroj. (gf)

* Ĉi tiu artikolo estas kompilita el kvar sendependaj raportoj, kiujn verkis jenaj 12-jaraj partoprenintoj: Barbara Jantzen (bj, Francio), Gunnar Fischer (gf, FR Germanio), Dejvid Walsh-Kemmis (dwk, Irlando) kaj Mariann Behrmann (mb, Hungario).

Demandojn pri la 26-a IK, en Kubo, direktu al la Komisiito pri Infanaj Aferoj, s-ro Christopher Fettes, St. Columba's College, Dublin 16, Irlando.

FAMILIOJ

Post dek jaroj, alvenas nova generacio de denaskuloj

Interagado de familioj kun infanoj denaske parolantaj Esperanton eniris jam duan jardekon. En la hungara urbo Győr okazis en aŭgusto la 11-a (Tradicia) Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj. Ĉi-jare el 11 landoj ĉeestis pli ol 50 aliĝintoj.

Infanoj siatempe nur 3–4-jaraj, kiuj interamikiĝis ĉekomence, jam adoleskiĝas. Pluraj el inter ili jam ne bezonas por esperantisteco familian flegadon, sed komencas pli kaj pli forte aliĝi memstare al junularaj societoj. Do iom post iom la konsisto de tiu ĉi medio plene ŝanĝiĝas; feliĉe regule alvenas novuloj kun infanoj apenaŭ 2–3-jaraj. Antaŭvideble pro propra bezono ili prizorgos la renkontiĝojn ankaŭ en la venontaj jaroj.

Oni jam interkonsentis, ke la Tradicia Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj en 1990 gastos en Ĉeĥoslovakio. Cetere ĝis nun la esperantistaj familioj renkontiĝis nur po unu fojo en tiu ĉi lando, en Jugoslavio kaj en Pollando. Ĉiuj aliaj renkontiĝoj estis aranĝitaj en Hungario. La partoprenantaro ja pleje devenas el Mez-Eŭropo, kvankam familioj, aŭ almenaŭ geedzoparoj aŭ unuopuloj, ĉiam venis ankaŭ el Okcident-Eŭropo, kaj ne malofte eĉ el aliaj kontinentoj, precipe el Azio (trifoje el Japanio).

Espereble ankaŭ en la futuro la partoprenkotizoj restos tolerblaj. Foj-foje Hungara Esperanto-Asocio iom subvenciis la

La Komisiono de UEA pri Generaciaj Problemoj

celas:

- teni en kontakto kun la esperantlingva komunumo la homojn, kiuj troviĝas en la vivo-fazoj inter geedziĝo kaj malfrua matureco (tio estas kiam la gefiloj iĝas sendependaj), provante solvi ties apartajn problemojn;

proponas labori pri:

- paroj, kiuj uzas inter si Esperanton
- paroj, en kiuj unu el la partneroj estas neesperantisto
- familioj kun infanoj en kiuj oni, prefere denaske, instruas Esperanton al infanoj;

jam nun funkciigas:

- cirkuleron por esperantlingvaj familioj
- adresaron de esperantlingvaj familioj
- kolekton de vortoj pri hejmaj aĵoj por hejmaj parolantoj de Esperanto
- interŝanĝadon de informoj inter aranĝantoj de familiaj renkontiĝoj;

konsistas el:

- komitatanoj de UEA, kiuj kunordigas la laboron kaj raportas al la instancoj de UEA (nuntempe R. Corsetti kaj Z. Tišljár)
- kunlaborantoj, kiuj samnivele decidas pri la farota laboro kaj plenumas ĝin;

serĉas kunlaborantojn pri:

- rilatoj kun TEJO kaj informado al TEJO-anoj pri ilia ebla esperantista estonteco
- rilatoj kun naciaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj por serĉado de adresoj kaj ĝenerala informado pri ĉi tiu laboro
- rilatoj kun aliaj Esperanto-organizaĵoj (SAT, ktp) similcele
- okupiĝado pri la problemoj de paroj kun unu neesperantista partnero
- aranĝado de lokaj, naciaj kaj internaciaj aranĝoj por paroj kaj familioj en ĉiuj mondopartoj (ĝis nun regulaj aranĝoj okazas nur en orienta Eŭropo)

Kontaktu nin pere de la Centra Oficejo de UEA se vi volas labori en unu el la menciitaj kampoj.

renkontiĝon, kaj oni ankaŭ povis ebligi rabaton, foje tute senpagan partoprenon al kelkaj etinfanoj. La cirkonstanco, ke organizaj elspezoj praktike ne ekzistas, malaltigas la prezojn. En Győr, ekzemple, la familio Horváth – kvar esperantistoj – faris ĉion eblan por la plena sukcesigo de la aranĝo, laborante de frua mateno ĝis la noktaj horoj, kiel kutime senpage. Same aktivis ankaŭ s-ino Marie Grela el Belgio, kiu regule instruis dancojn al la ĉeestantaro, kaj du japaninoj (s-ino Yazuko Sasaki kaj s-ino Masako Tahira), krome ankoraŭ pluraj aliaj.

Antaŭ la venonta, 12-a renkontiĝo oni planas kompili ian rekomendaron/gvidilon por la posteuloj, surbaze de la ĝisnunaj spertoj. Ja ne ĉesas la intereso al tiu ĉi tre speciala familia edukado de etinfanoj.

Csiszár Ernő

Kulich Gy. u.25.V.16, H-8100 Várpalota, Hungario

Orienta leciono pri entreprenemo

En julio 1989 mi pasigis du semajnojn en Bulgario. Temas pri mia unua vizito al tiu peco de Eŭropo, sternita sur la montarojn Balkano kaj Rodopoj kiel sunsekiĝanta verda tapiŝeto. Kun mia gastiganto Ljubomir Trifončovskij mi tratrajnis ĝin. Eblis ekhavi impreson pri la organizo de la bulgara Esperanto-movado, kiu antaŭ nur du jaroj gajnis la Trofeon Fyne pro sia agado. Tiu propra sperto ne seniluziigis. La bulgaroj frontas la samajn problemojn kiel ni ĉiuj, sed sur bazo tiel firma ke ĝi povus revigi iun ajn landan movadon.

Inter la betonaj monolitoj de Sofio mi pasigis nur du tagojn. Tio sufiĉis tamen por konstati ĉiean ĉeeston de Esperanto-burooj kaj butikoj. La oficejoj de BEA ("kancelarioj" diras ili) dissemiĝis tra la centra kvartalo: jen iuloke laboris la ĉef-delegito, jen aliloke la ĝenerala sekretario, jen en tria la redakcio de *Bulgara esperantisto*. Ne nur la oficejoj flirtigis la verdan stelon en la ĉefurbaj stratoj, sed krome memoraĵbutikoj, klubejoj kaj la entreprenaroj Globus kaj Bulgara Esperanto-Kooperativo.

Kiel klarigis al mi la ĉefadministranto de BEA, ĝenerala sekretario Dimităr Papazov, en tiuj entreprenaroj kuŝas unu el la sukcesoj de BEA. La asocio bone fartas finance: sen ŝtata mono ĝi jam planas renovigi aŭ konstrui "kulturdomojn" en Sofio, Vraca, Ruse kaj Velingrad (aldone al jam ekzistantaj en kvar-kvin aliaj lokoj), evoluigas kursejon en balkana vilaĝo Koprivŝtica, konsideras aĉeton de plia kursejo en pitoreska loko borde de la Nigra Maro. Per saĝa investopolitiko kaj iom da bonŝanco, BEA trovas sin relative imuna al la mona krizo, kiu lastatempe blovigis frostan venton tra la instituciaj koridoroj. Aro da organizaĵoj, kiel ekzemple la bulgara pac-komitato, perdis la eblon presi siajn eldonaĵojn; la esperantistoj eĉ plialtigis la kvaliton de sia revuo. Ankaŭ la ioma liberaligo de la bulgara ekonomio verŝajne favoros la Esperantan entreprenemon.

En Sofio mi povis renkonti ankaŭ la prezidanton de BEA, Sava Dălbokov – ĉarma veterano de la laborista Esperanto-movado, eksministro kaj vicprezidanto de la Patrolanda Fronto. Lia prestiĝo multe helpis la movadon dum la lastaj du jaroj.


En Vraca, la rokura "pordo" de Balkano 150 kilometrojn norde de Sofio, mi povis sperti pli tipan etoson de loka movado. Tamen ne tute tipan. Vraca estas unu el la motoroj de bulgara Esperantujo, fabriko de bonaj parolantoj, inspiraj ideoj kaj talentaj aktivuloj. Prezidanto de la urba klubo Stojan Pavunĉev samtempe direktoras la urban bankon; Ljubĉjo, mia gastiganto, laboras ĉe la urba pupteatro kiel ĝia konstanta dramverkisto; alia populara klubano, Kiril Velkov, estas astronomo kaj scienca konsilanto. Mi renkontis ankaŭ la uragane entuziasman instruiston Bojĉo Mladenov, renoma korespondanto kiu ŝajne persone konas duonon de la loĝantaro. Esperanto ĝuas tian prestiĝon en Vraca, ke loka kemia fabriko ĉiujare sponsoras internacian Esperanto-recitalon dediĉitan al la bulgara poet-heroo Ĥristo Botev. Krom kursoj – foje je landa nivelo – oni organizas ankaŭ literaturan seminarion, filmfestivalon kaj aliajn kulturajn eventojn. Donaco de la urba registaro baldaŭ starigos Esperantomon sur la pitoreska centra placo.

En Pleven, kie la Danuba ebenaĵo subite ekondas antaŭ la Balkana suprenŝvelo, mi tagmanĝis kun iniciatinto de la aŭgustaj Esperanto-laborbrigadoj. "Venas sufiĉe multaj plendoj pri ili," mi atentigis lin. Ivajlo kapjesis kaj klarigis, ke post kelkjara paŭzo (li fariĝis kirurgo) li reprenas la organizadon kaj celas plibonigon.

La stacidomo en Gorna Ojaŝovica, unu el la plej grandaj fervojkruciĝoj, fieris pri du Esperantaj informtabuloj starigitaj de la loka IFEF-sekcio. De tie ni prenis taksion ĝis Veliko Târnovo. Fantazia labirinto de montoj kaj valoj gardas kvazaŭ sekreta trezorejo la antikvan bulgaran ĉefurbon, kies stratoj kaj domoj restas juveloj de pasintepoka konstruarto. En ĝia ĉefstrato pendis standardo, anoncanta al la mondo la 10-an Someran Esperanto-Universitaton. Ĉambroj, manĝejoj kaj la ĉefa aŭlo de la universitato estis je nia dispo. Kvankam la rektoro kaŝis sin ie for de la svarmantaj studkandidatoj, en la inaŭguro parolis lia deputito plus la urbestro kaj la prezidanto de BEA. Pri ekstera atento, ankaŭ flanke de la gazetaro, oni ne povis plendi.

Eĉ la plej bonan organizan preparon subfosus la nealveno de kvar el kvin invititaj eksterlandaj gastoj. Spertaj bulgaraj parolantoj montris admirindan pretecon ensalti la breĉojn, estigitajn de akcidentoj kaj malsano. Enhave, tamen, la programo neeviteble suferis. En internacia Esperanto-aranĝo, unusola landa movado neniam kapablas provizi sufiĉe larĝan gamon de spertoj, perspektivoj kaj talento. Aliflanke, la aŭskultantaron mi ŝatis. Ducento da homoj, el ĉiuj aĝ- kaj spertniveloj, aŭskultis atente kaj starigis interesajn demandojn postprelege. Foje la respondado al ili preskaŭ tiom daŭris kiom la prelego mem – kiel ideale okazas en intelekta aranĝo.

Ekkonante la bulgaran movadon, mi miris pri ĝia simileco al aliaj en Eŭropo. La apartaj kondiĉoj de la bulgara ŝtatsistemo kaj ĝia foje iom truda ideologio, la fakto ke nur antaŭ iom pli ol jarcento tiu ŝtato reakiris sian sendependecon, la speciala kulturo de la Balkana duoninsulo – ĉio ĉi sentiĝis kvazaŭ periferia al la komunaj ecoj de la Esperanto-movado. Oni



rakontis al mi, ke la prezidanto de BEA devas lukti kun problemoj tute ne starigita de aliaj landaj movadoj: la nebridebla individuismo de la membroj. Oni atendas trakton ne kiel movadero sed kiel persono. Tiu universala esperantista trajto eble fontas, kun la karakteriza pasia amatorismo, el tre profunda rolo de la lingvo en la homa psiko. En ĉiu okazo, estis facile senti min hejme, aparte inter la junaj bulgaroj de mia propra generacio.

Ĝuste tiu generacio transprenas nun la gvidon. Pasintjare okazis balkana ekvivalento de la Hamburga UK: talenta grupo de eksaktivuloj el Bulgara Esperanto-Junularo ekokupis ŝlosilajn postenojn en BEA. Inter ili troviĝas la ĉefdelegitino Cvetka Miteva, la redaktorino de *Bulgara esperantisto* Maria Jankova kaj la eldonestrino Mariana Evlogieva. Kvankam ili sentas, ke ili ankoraŭ ne gajnis la plenan fidon de la pli maljunaj movadanoj, tiu grupo kun la apogo de la BEA-buroo kuraĝe iniciatis diversajn ŝanĝojn. Cele al malcentrigo de la decidpovo, oni anstataŭigis la malnovan sistemon de 28 distrikta estraroj per nur ok "regionaj organizantoj", kiuj (principe) simple kunordigas la memstaran agadon de pli ol 250 lokaj societoj. Oni fondis novajn komisionojn, i.a. pri kulturo, organizo, edukado kaj financo, malfermitajn al homoj ekster la Centra Estraro. Komisiono pri internacia agado celas plivigligi la kontaktojn kun aliaj landoj, aparte per interŝanĝoj. Al tio kontribuos ankaŭ nova turisma firmao, "Esperantoturist", sub gvido de Maria Toleva. En 1989 estas refondita Scienca Esperanto-Societo, sekcio kaj de BEA kaj de la Asocio de Bulgaraj Sciencistoj. Oni esperas ripeton ĉe la Asocio de Bulgaraj Artistoj. Plia eks-BEJ-estrarano, Mariana Elenova, transprenis la Bulgaran E-Muzeon en Sofio kaj planas evoluigi ĝin en veran bibliotekon kaj arkivon por la landa movado.

Ankaŭ en Pisanica mi trovis fermenton. La fama internacia kursejo staras alte sur montŝultro en Rodopoj, meze de krutaj

Verdaj montoj leviĝas malantaŭ partoprenantaro de la 10-a Somera Esperanto-Universitato en Veliko Târnovo.



pinarbaj deklivoj kiuj ondumas, oceansimile, ĝis la horizonto. Por iri tien el Veliko Târnovo, ni devis trajni kvar kaj duonan horojn ĝis Plovdiv kaj plubusi ankoraŭ tri. La vojaĝo tamen indus. De ses monatoj nova direktoro, s-ro Planov, okupiĝas pri funda repripensado de la agado. La kursejo fariĝis finance memstara: ne plu faras la decidojn iu estraro en fora Sofio. Oni diris al mi, ke jam la domo mem plibeliĝis: mi certe trovis ĝin tute taŭga kaj komforta. Planov, mem esperantisto, volas fari ĝin eĉ pli avantaĝa por la movado: dum la esperantistoj daŭre ricevos grandan rabaton, aliaj devos pagi normalajn sumojn por tia nivelo de servoj. Tiun nivelon li esperas signife altigi, enkondukante pli varian programon, inkluzive de sportaj, kulturaj kaj turismaj aranĝoj.

La konstanta instruistino de la kursejo, Detelina Kalajĝieva, montris al mi la klasĉambrojn kaj bibliotekon. Precipe tiu lasta ŝajnis al mi frappe malriĉa por tia internacia centro. Samopiniis ĵus-alveninta GDR-anino, kiu malgaje konstatis la mankon de movadhistoriaj verkoj kaj aparte bedaŭris ne trovi *La danĝera lingvo*. Eldonistoj kaj donacemuloj bonvolu atenti!

Se Pisanica kaj la najbara urbo Smoljan estis pitoreskaj, ilin tamen superis la mirinde bela urbeto Ŝiroka Lâka, kie mi renkontis mian bulgaran koleginon Maria Jankova. De ŝi mi aŭdis esperojn por pliinternaciigo de *Bulgara esperantisto*, kaj ankaŭ fieron pro la jam konstatebla plibonigo en aspekto kaj enhavo. Sed sieĝas duboj: ĉu Esperanto vere signifas ion socie gravan? Ŝi laciĝas, kiel multaj, de la minoritateco de la movado, ĝiaj tendenco al sekteco kaj manko de ŝanĝopovo. Ambaŭ problemojn mi renkontis jam tri tagojn pli frue en diskuto kun Valeta Baneva. La juna redaktorino de *Paco* – la organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) – sentas la bezonon de renovigo, sed ne scias efektiviĝi ĝin. Ŝia organizaĵo perdis allogon por la junaj esperantistoj; ĝia ideologio ŝajnas anakronisma, ĝia strukturo plene rustiĝinta. Nur la tradicio, kaj ia respekto por la iamaj idealoj, tenas ĝin ankoraŭ viva. Ĉu, demandis Maria nun dum ni promenis inter zorge konservataj domoj el antaŭa epoko, la sama validas por la movado ĝenerale?

La sekvan tagon mi aŭdis similajn dubojn de MEM-sekretario Fani Mihajlova, energia adminstranto kaj instruisto kiu kondukis nin tra la antikva centro de Plovdiv. Kiel unu el la ok "regionaj organizantoj" de BEA, ŝi konstante vojaĝas inter la kluboj de la departemento. La sperto lasas ŝin nekontenta. Kvankam la nova sistemo devus teorie stimuli la lokan agadon, ŝi trovas ke malmultaj societoj estas en stato profiti el sia memstareco. Preskaŭ la tuto de ŝia tempo elspeziĝas por rutinaĵoj. Simile okazas en MEM: pri ĝi ŝi kovas eĉ malpli da espero. El la geto de fermitaj rondoj kaj seniniciatemo ŝi ne vidas eliron.

Sed en la centro de Plovdiv ni vizitis renovigitan Esperanto-domon vid-al-vide de la Asocio de Bulgaraj Verkistoj. Vespere, dum krepusko malsuprenglitis la romiajn murojn, mi diskutis kun Ljubĉjo la fondon de movada Unesko-klubo. Dancis en mia memoro bildoj el la vojaĝo: Kunĉo Valev, filologo en la plena senco de "lingvoamanto", kiu super restoracia tablo rakontis la tutan historion de sia lando; instruisto-inĝeniero Nikola Uzunov kaj lia filino Maria, parolantaj pri la esperoj de politika kaj socia malfermiĝo; verkisto Georgi Mihalkov, kun kiu mi dividis pensojn pri la bulgara kaj Esperanta literaturoj.

Ne mankas saĝaj kaj realismaj optimistoj en la bulgara movado. Nek mi nek ili revas pri finaj venkoj, la konkero de la mondo. Per praktikaj paŝoj ili certigis financan kaj socian bazon, kiun ni povas eluzi por la tuta eŭropa movado. Bulgario meritas ekkonon. Inter dek mil esperantistoj troviĝas sufiĉe da talentuloj por ebligi surprizajn atingojn – en ekstermovadaj rilatoj, en kursoj, en seminarioj, en turismo. Kaj en simplaj homaj kontaktoj kun varmkora kaj sincera popolo.

Mark Fettes

10.000 vortoj. Esperanta-kroatserba kaj kroatserba-Esperanta vortaro. F. Gruić, A. Kocian, A. Šimunić, J. Pleadin. Đurđevac: Liberiga Stelo, 1989. 154p. 16cm. 4,50 gld.

AME: Aktuala metodo de Esperanto. Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1987. 142p. 21cm. Internacia lernolibro por la klasĉambro, verkita (plejparte) laŭ la ofteclistoj de la Zagreba metodo, sed sekvanta apartan gramatikan metodon. Multaj ekzercoj. 14,40 gld.

Antikvaj filozofoj de Ĉinio. Hoŭ Ĝjüeljang. El la ĉina trad. Li J., Ĝan Ŝ. kaj Ŭang J. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 224p. ISBN 7-5052-0002-X. 18cm. Populara prezento de tridek pensuloj el la ĉina historio, ekde Konfuceo, Laŭzio kaj Ĝŭangzio de antaŭ 2500 jaroj ĝis Hŭang, Gu kaj Ŭang en la 17-a jarcento. 12,00 gld.

Bebo kaj la eminenta sinjoro Pompulo. José Martí (1853-1895). El la hispana trad. Arnoldo Águila. Havano: José Martí, 1988. 8p. 28cm. Ilustrita infanrakonto el la mondperspektivo de bebo. 3,00 gld.

Bovisto kaj teksistino. Ĉinaj popolaj rakontoj. Kompilis Hŭa Ĝjiĉing k.a. El la ĉina trad. Censinio, Seimin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 54p. ISBN 7-5052-0007-0. 18cm. Ilus. Kvar legendoj disvastiĝintaj en tuta Ĉinio. 3,60 gld.



Das Kausativ und das Antikausativ in der gemischten Plansprache Esperanto. Dietrich M. Weidmann (1960-). Schaffhausen: Weidmann's Mondo-Servo, 1989. 95p. ISBN 3-909140-00-9. 21cm. Studo pri la roloj de -ig- kaj -iĝ- en la vortformado. 31,20 gld.

Deveno de Esperanto, La. Geraldo Mattos (1931-). Chapecó: Fonto, 1987. 105p. 21cm. Lingva kolekto n-ro 1. Studo pri la lingvokrea metodo sekvita de Zamenhof. 14,40 gld.

Elementa lernolibro de Esperanto. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1989. 32p. 21cm. Eleganta prezento por japanlingvanoj. 6,40 gld.

Esperanto Handbook for Teachers. Guide to the International Language. El Cerrito: ELNA, 1988. 31p. 21cm. Konsiloj pri la instruado de Esperanto. 4,20 gld.

Historio de la kulero kaj la forketo. José Martí (1853-1895). El la hispana trad. Arnoldo Águila. Havano: José Martí, 1988. 10p. 28cm. Ilustrita infanrakonto pri la manĝilfabrikado. 3,00 gld.

Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI. Rotterdamo/Antverpeno: UEA/ILEI, 1989. 36p. 20cm. Gvidilo al la elementa kaj meza ekzamenoj, kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. 6,60 gld.

Kamelo Ŝjangzi (1936). Laŭ Ŝe (1899-1966). El la ĉina trad. Ŭang Ĉongfang. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 319p. ISBN 7-5052-0023-2. 21cm. Bind.. Mapo kaj ilustraĵoj. Realisma romano pri la tragedia sorto de Pekina rikiŝisto en la tridekaj jaroj; ĉefverko de la aŭtoro. 18,00 gld.

Kuriozaj floroj kaj arboj en la provinco Yunnan, Ĉinio. Div. aŭtoroj. El la ĉina trad. Seimin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 146p. ISBN 7-5052-0034-8. 26cm. Bind. Lukse eldonita foto-libro, kun indikoj de specia kaj familia nomoj kaj mallongaj komentoj pri apartaj ecoj de ĉiu planto. 45,00 gld.

Lernolibro Esperanto-urdu. Islamabad: Muqtadra Qaumi Zaban, 1987. 216p. 22cm. Bind. Inkluzivas selekton el la Ekzercaro, kun glosoj. 22,50 gld.

Mi juna (1975). Manashi Das Gupta (1928-). El la bengala trad. Probal Daŝgupto (1953-). Rotterdamo: Esperantaj Kajeroj, 1989. 102p. ISBN 0 9505323 9 8. 20cm. Skizo de la vivo en Bengalio dum la tridekaj kaj kvardekaj jaroj el la perspektivo de sendependema knabino. 18,00 gld.

Momento el eterno/Augenblicke aus Ewigkeit. Rose Ausländer (1901-1988). El la germana trad. Franz-Georg Rössler (1949-). Gerlingen: Bleicher, 1989. 110p. ISBN 3-88350-506-4. 19cm. Mallongaj, fragmentecaj poemoj pri spertoj el la juneco, la nazia persekutado kaj la vivo en maljunulejo: malgraŭ ĉio, ili elspiras ian serenecon. 14,40 gld.

Nekonata dio, La. Ferenc Mócsi. El la hungara trad. Istán Nagy. Chapecó: Fonto, 1988. 42p. 21cm. Novelo pri la homa tragedio malantaŭ aro da argilaj statuetoj, trovitaj en vilaĝruino. 6,00 gld.

Nigra pupo, La. José Martí (1853-1895). El la hispana trad. Arnoldo Águila. Havano: José Martí, 1988. 14p. 28cm. Ilustrita infanrakonto. 3,00 gld.

Norda odiseado kaj aliaj rakontoj. Jack London (1876-1916). El la angla trad. Fernando de Diego (1919-). Chapecó: Fonto, 1988. 111p. 21cm. Noveloj pri la "barbare nobla" lukto kontraŭ la sovaĝa naturo de norda Nordameriko, de usona majstro en tiu ĝenro. 14,40 gld.

Nova Realismo, La. La konsekvenco de la Nova Pensado. Bruno Vogelmann (1909-). El la germana trad. la aŭtoro. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1989. 185p. ISBN 90-71205-29-0. 20cm. Argumentoj por mondkoncepto bazita sur respekto al la vivo kaj al la homa racio. 27,00 gld.

Rakonto pri elefantoj. José Martí (1853-1895). El la hispana trad. Arnoldo Águila. Havano: José Martí, 1988. 14p. 28cm. Ilustrita infanlibro. 3,00 gld.

Sfinkso de Steplando, La. V. A. Glazunov. Chapecó: Fonto, 1988. 110p. 21cm. Fonto-serio n-ro 20. Vivecaj rakontoj inspiritaj de la vojaĝoj de sovetia geografo, verkitaj en klara, senĝena lingvaĵo. 14,40 gld.

Sonetoj (1917). Marie Under (1883-1980). El la estona trad. (1929) Hilda Dresen (1896-1981). Chapecó: Fonto, 1988. 59p. 21cm. Fonto-kajeroj n-ro 5. Pasiaj kaj teneraj versaĵoj pri amo kaj naturo, de "la plej granda estona poetino". 6,00 gld.

Tri herooj. José Martí (1853-1895). El la hispana trad. Arnoldo Águila. Havano: José Martí, 1988. 12p. 28cm. Ilustrita infanrakonto pri Bolívar, San Martín kaj la sacerdoto Hidalgo, kiel liberigantoj de Latina Ameriko. 3,00 gld.

Turnopunkto al tutmonda socio. Tezoj pri Bahaa Koncepto. Ingo Hofmann. Hofheim-Langenhain: Bahá'í-Verlag, 1988. 10p. ISBN 3-87037-217-6. 14cm. 0,60 gld.

Vortaro Esperanto-urdu. Islamabad: Muqtadra Qaumi Zaban, 1987. 484p. 22cm. Bind. Unudirekta, plejparte el vortparoj. 37,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

75-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Havano (Kubo), 14-21 julio 1990

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Kuba Esperanto-Asocio,
Apartado postal 2018, 10200 La Habana 2, Kubo

Loka Kongresa Komitato (LKK): Prezidanto: Jesús A. Castillo Jiménez; vicprezidanto: Julián Hernández Angulo; sekretario: Alberto Fernández-Calienes; protokolisto: Petra Blanco; kasisto: Maritza Gutiérrez González; loĝigo: Miriam Menciondo; ekskursoj: Roberto Guthrie Ruiz; komercaj rilatoj: Alberto Rodríguez Pineda; artaj aranĝoj: Martín Castro López; junularaj aferoj: Roberto Cutiño Palau; Infana Kongreseto: Niurka Alonso Santos; gazetara servo: Miguel A. Peñate Rivero; eksterlanda informado: Orlando Raola; ĝicetoj: Francisco J. Briel de Cañas; kongresejestro: Gustavo Morales; vojaĝaranĝoj: Isabel María Viera.

Kongresa temo: La reĝisoro de la kongresa temo "Esperanto, evoluo, kultura diverseco" estos d-rino Jane Edwards, etnologo el Usono. Ŝia faka kono de la temo kaj flua rego de la hispana lingvo estos aparte avantaĝaj en la antaŭvidataj kontaktoj kun sudamerikaj kaj lokaj ekstermovadaj fakuloj.

Internacia Kongresa Universitato (IKU): En la kadro de la 75-a UK okazos la 43-a sesio de IKU. Universitataj lekciistoj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU ĉe la sekretario: prof. Bruce Sherwood, Dept. of Physics, Carnegie Melon University, Pittsburgh PA 15213, Usono. Por kandidatiĝi oni sendu pasportformatan foton kaj kvar kopiojn de la titolo, resumo, bibliografio kaj biografieto antaŭ 15 januaro 1990. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne repagon de vojaĝkostoj. Ili devas mem prizorgi sian aliĝon al la kongreso. Oni aparte invitas proponojn de junaj universitataj instruistoj kaj profesoroj, kaj de tiuj kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU. Estus bonvene se la prelegoj traktus iujn el la aspektoj de la kongresa temo.

Esperantologia Konferenco: La 12-an sesion de ĉi tiu populara aranĝo organizos la Centro por Esploro kaj Dokumentado (CED) kaj ĝin gvidos d-ro Humphrey Tonkin.

Tago de la Lernejo: La ĉefa programero por E-instruistoj okazos marde la 17-an de julio, kaj ĝia kadro-temo estas "Naciaĵoj kaj internaciaĵoj en E-lernomaterialoj". La organizanto de la Tago, ILEI, gvidos ankaŭ la Internaciajn Ekzamenojn de ILEI/UEA je elementa kaj meza niveloj.

Artaj aranĝoj: Ĉi-jare oni klopodas alimaniere prepari la kongresajn artajn programerojn. UEA malfermas konkurson kaj invitas ĉiujn interesitajn artistojn sendi sinproponon. La kandidatoj menciui, en kiu parto de la kongresa programo ili aspiras partopreni, kaj donu elementajn informojn pri la prezentaĵo kaj la kondiĉoj de la partopreno. Nepre petu detalan formularon de la Kongresa Fakto en la CO.

Internacia Junulara Kongreso (IJK): La datoj de la TEJO-kongreso ŝanĝiĝis, tiel ke ĝi okazos post la UK de la 21-a ĝis la 28-a de julio. La loko tamen restas sama:

Playa Girón, 220 kilometrojn for de Havano. Oni disponas pri 110 ĉambroj en komfortaj kaj modernaj bangaloj kun klimatiziloj. Verŝajne okazos postkongresaj aranĝoj en la sama regiono kunlige kun IJK, riĉigitaj per ekskursoj kaj aliaj allogaj eroj.

Filatelaĵoj kaj numismatikaĵoj: La koncernaj registaraj instancoj en Kubo jam decidis eldoni specialan poŝtmarkon (eble eĉ tutan serion?) omaĝe al la 75-a UK. Krome, estos emisiita speciala porokaza monero de la Nacia Banko de Kubo. Tiuj filatelaĵoj kaj numismatikaĵoj estos ne nur aĉeteblaj surloke sed ankaŭ mendeblaj anticipe, pri kio ni esperas povi baldaŭ informi vin.

Dua Bulteno: La Dua Bulteno, kiu enhavos detalajn informojn pri loĝado, ekskursoj, antaŭ- kaj post-kongreso(j), la ĉirkaŭkongresaj aranĝoj, prezoj, kongresa programo kaj aliajn utilajn informojn, aperos jam fine de novembro. Ĝi enhavos ankaŭ la necesajn mendilojn.

Flugvojaĝoj: Ni jam anoncis, ke UEA okupiĝas pri organizo de pluraj flugkaravanoj al la 75-a UK. Kvankam la nacia flugkompanio de Kubo, Asociación Cubana de Aviación, estas la oficiala flugkompanio de la Kongreso, estas klare tiel al ĝi kiel al ni, ke necesas dividi la grandegan nombron da pasaĝeroj inter pluraj flugkompanioj. Tre baldaŭ, plej malfrue en la Dua Bulteno fine de novembro, UEA proponos siajn flugkaravanojn. Ni konscias, ke urĝas anonci ilin, sed ankaŭ vi konscias, ke ni ne deziras cedi pri la kvalito kaj certeco de tiuj aranĝoj por malbone servi al niaj membroj. Ĉiukaze atendu nian oferton antaŭ ol decidiĝi kiel vi flugos al Kubo.

Kotizoj: Ĝis la 31-a de decembro validas la jenaj tarifoj en guldenoj (la parentezoj indikas la tarifon por netranspagipovaj landoj): individua membro de UEA 180 (90), nemembro 225 (112), kunulo/junulo/handikapulo kiu mem estas individua membro de UEA 90 (45), kunulo/junulo/handikapulo-nemembro 135 (68). Oni notu ke membroj kun gvidlibro (MG) ne ricevas la kongresan rabaton.

Statistiko: Se juĝi laŭ la aliĝoj ĝis la 10-a de oktobro, regas grandega intereso pri la 75-a UK: jam aliĝis ĉ. 800 kongresanoj! Tie ankoraŭ troviĝas neniuj kongreslandaj aliĝoj, kvankam ni povas certi, ke la Kongreson partoprenos pluraj centoj da kubanoj.

Preĝejo "La Caridad del Cobre"



Rekono al kvar esperantologoj kaj instruistoj

La Komitato de UEA nomis en Brajtono kvar novajn honorajn membrojn de la Asocio. Jen koncizaj biografiaj notoj pri la honoritoj.

Prof. Stojan ĜUĜEV naskiĝis la 19-an de decembro 1903 en Pazarĝik, Bulgario. Jam 17-jara li aktivis en la junulara E-movado en Sofio, kie li ekstudis muzikon. Li faris postdiplomajn studojn ĉe Sorbono en Parizo (1926-1931), doktoriĝante pri muzikologio. Ankaŭ dum tiu periodo Ĝuĝev aktive partoprenis la movadon en Parizo, kaj fariĝis i.a. redaktoro de la pariza eldono de la revuo *Oomoto internacia*. En tiu periodaĵo aperis serio de liaj esperantologiaj tekstoj sub la pseŭdonimo L. Grin.



En 1932 Ĝuĝev revenis al Bulgario, por poste profesoriĝi pri muzika etnografio kaj fariĝi estro de la katedro pri muzikaj sciencoj ĉe la Ŝtata Muzika Altlernejo en Sofio. Jam antaŭ la Dua mondmilito li fariĝis vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, kaj dum la milito li rolis kiel ĉefredaktoro de *Bulgara esperantisto*, en kiu aperis multaj liaj tekstoj. Ankaŭ post la milito Ĝuĝev estis dum 10 jaroj prezidanto de BEA. En aro da Universalaj Kongresoj

li prelegis en la kadro de la kongresa universitato. Li estas jam de multaj jaroj membro de la Akademio, kaj li dum longa tempo servis kiel ĝia vicprezidanto. Ĝuĝev aktivis ankaŭ en Muzika Esperanto-Ligo kaj de pluraj jaroj servas kiel juĝkomisionano en la branĉo Kanto de la Belartaj Konkursoj. Dum sia 70-jara agado por Esperanto Ĝuĝev publikigis pli ol 40 eseojn, studojn kaj artikolojn pri esperantologiaj temoj.

Douglas B. GREGOR naskiĝis en 1909 en Swansea, Kimrio, studis klasikajn lingvojn en Oksfordo, laboris kiel lingvo-instruisto kaj poste kiel interpretisto. Li lernis Esperanton jam en 1922 kaj samjare aliĝis al la brita E-movado. Post la Dua mondmilito li estis prezidanto de la Societo de Britaj Esperantistoj (1954), redaktoro de "Brita esperantisto" (1959-62), membro de la Akademio de post 1964 kaj ĝia sekciestro pri gramatiko inter 1965 kaj 1971. Kiel multjara kunlaboranto de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, li okupiĝis i.a. pri kompilo de informoj pri la tradukoj en la naciajn lingvojn, kie Esperanto servis ĉu kiel fonto, ĉu kiel ponto. Li krome aperigis plurajn konatajn studojn. En 1965 aperis lia elokventa pledo en la angla pri "La kultura valoro de Esperanto", kaj jam pli frue J. Régulo eldonis liajn tradukojn el Sofoklo, *Reĝo Edipo* kaj *Antigona* (Stafeto, 1960). D.B. Gregor apartenas el tiu rondo de erudiciuloj, kiuj en la postmilita periodo faris ŝlosilan kontribuon al evoluigo kaj firmigo de la Esperanta kulturo.

Alec VENTURE naskiĝis en 1910, kaj jam en 1929 aliĝis al la Londona Esperanto-Klubo. Tie li gvidis diversnivelajn kursojn ekde 1932, prelegis, estis konsiliano, estris superan kurson (1960-1980), kaj ekde 1980 estas ĝia honora vicprezidanto. Tra la sama 60-jara periodo li aktivis en la kadro de Brita E-Asocio,



i.a. kiel ekzamenisto por diversgradaj ekzamenoj (1935-1985), kasisto, membro de la Konsilantaro, kaj gvidanto de korespondaj kursoj. Ĉe UEA li membris en la juĝkomisiono pri la Belartaj Konkursoj (1965-74), por poste fariĝi sekretario de la Konkursoj (1974-85). Membro de la iama komisiono por la Internacia Ekzameno, li estas ankaŭ komisiito de la Lingva Servo de post 1969. Liaj verkoj inkluzivas kunlaboron en *Facila legolibro* (1932), *Enciklopedio de Esperanto* (1933), *Radio-*

terminaro (1943), *Angla antologio*, vol. 1 (1957) kaj vol.2 (1987), *Internacia Komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj* (1974), la konsilaron *Laŭkazaj lingvaj notoj* kaj tradukon de *Erevono* de S. Butler (1978). Venture ankaŭ nun aktivas kiel kasisto de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). Tra la jardekoj li donis brilan ekzemplon pri persista, fidinda kaj krea movada administrado.

Norman WILLIAMS naskiĝis la 8-an de aŭgusto 1908 en Liverpulo (Britio); studis fizikon, matematikon kaj edukadon; laboris unue kiel instruisto, poste kiel lernejestro (1941-70). Williams informiĝis pri Esperanto en 1947, kaj nur unu jaron post ĝia eklerno li enkondukis la lingvon kiel devigan studobjekton en sia lernejo. Malgraŭ diversaj kontraŭstaroj, tiu lerneja instruado daŭris 27 jarojn kaj pli ol 3 000 ge-knaboj lernis Esperanton tie, ĉefe de J.H. Sullivan, kiun Williams postenigis en la lernejo. En la periodo 1950-69 Williams organizis 16 internaciajn vojaĝojn por siaj gelernantoj de Esperanto. Similan agadon li poste stimulis kiel la ĉefa aganto de Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo (1966-86), kies celo estas subvencii vojaĝojn de junaj esperantistoj eksterlanden. La Fondaĵo nun havas kapitalon de pli ol GBP 35 000 (ĉ. NLG 125 000). Tiu agado de Williams estis verŝajne lia plej grava kaj efika kontribuo al Esperanto: multaj aktivuloj de la brita kaj internacia movadoj spertis sian unuan kongreson per helpo de la Fondaĵo. Williams havas ankaŭ gravajn meritojn pri la daŭrigo de la tradicia instruado de Esperanto en la Universitato de Liverpulo. Sian ampleksan E-libraron li donacis al la Universitato de Manĉestro, kie ĝi restas daŭre alirebla por la publiko.



Kalendaro

Ni povas prezenti nur tiujn aranĝojn, pri kiuj oni informis nin! Bonvolu sendi kontribuojn por la marta kalendaro 1990 antaŭ la 10-a de februaro. Ni publikigas la datojn kaj kontaktadreson de internaciaj aranĝoj kaj ankaŭ de la landaj kongresoj, ie ajn en la mondo. Ni ankaŭ bonvenigas la adresojn de turismaj firmaoj, kiuj povas garantii priservon en adekvata Esperanto.

daŭre **BET "Esperantotur"**, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario
Esperanto-sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo "Express", Pk. 567, H-1395 Budapeŝto, Hungario

novembro

03-05: **Internacia Muzika Seminario**, Strážnice/Ostrava, Ĉeĥoslovakio (Josef Sučík, Masná 9, CS-702 00 Ostrava)
 06-11: **Azia Konferenco de Esperanto-Instruado**, Guangxi, Ĉinio (Guangxi Minzu Xueyuan, 530006 Nanning, Ĉinio)
 07-30: **Ekspozicio "Edmond Privat, esperantisto kaj pacisto"** en la Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Heldenplatz, Aŭstrio (Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Batthyangystiege, A-1010 Wien)
 10-12: **Nederlanda Esperanto-Kongreso**, Zeist, Nederlando (C. Bossong-Singer, Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven)
 16-19: **11-a Konferenco "Internacia Lingva Komunikado"**, Lodzo, Pollando (Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, RU ZSP Uæ, ul. Narutowicza 41, PL-90-125 Łódź)
 18-19: **6-a Internacia Kultura Esperanto-Festivalo**, Parizo, Francio (Daniel Doye, 169 Avenue de Choisy, F-75013 Paris)
 30-01: **Novembra Festivalo de Esperanto-Junularo**, montaro Ozren apud Tuzla, Jugoslavio (Esperanto-junularo, R. Vokića 2, Dom mladih, YU-75000 Tuzla)

decembro

08-10: **34-a Kultura Semajnfino**, Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda Esperanto-Ligo, Querstr. 11, D-6607 Quierschied; parolos Ulrich Lins pri "La danĝera lingvo")
 27-03: **6-a Internacia Festivalo**, Sensenstein, FR Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, 5300 Boon 1, FRG)
 27-02: **5-a Silvestra Esperanto-Renkonto**, Sudety-montaro, Pollando (Studenta Esperanto-Klubo, RO ZSP, ul. Fredry 7/9, PL-60-967 Poznań)
 27-03: **33-a Internacia Seminario de GEJ**, Neumünster, FR Germanio (Germana E-Junularo, Rheinweg 15, D-5300 Bonn 1; temo "Sovetunio")
 28-02: **Vintra Esperantista Ferio**, Budapeŝto, Hungario (Esperanto-Sekcio de Express, adreso supre); samloke, decembro 28-29: **3-a Internacia Ekonomikista Simpozio** (Ekonomikista Grupo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto)
 28-02: **19-a Vintra Esperantista Feriado**, Budapeŝto, Hungario (Vojaĝoficejo Express, Pf. 567, H-1395 Budapeŝto)

januaro 1990

iam en januaro: **3-a Internacia Ekonomikista Simpozio**, Budapeŝto, Hungario (EDUKO, Pf. 50, H-2041 Budaörs)
 05-07: **Novzelanda Esperanto-Kongreso**, Heretaunga, Novzelando (A.J. Knight, P.O. Box 41-172, St Lukes, Auckland 3)
 08-marto 09: **Kurso por komencantoj**, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, Box 192, S-691 24 Karlskoga)
 10-12: **Aŭstralia Esperanto-Kongreso**, Melburno, Aŭstralio (LKK, 124 Croydon Road, Croydon, Victoria 3136)
 12-20: **31-a Internacia Fervoja Esperanto-Skisemajno**, Sand, Taufers, Italio (Vitus Röder, Blumenstr. 5 A, D-8400 Regenbühl, FR Germanio)

februaro

05-09: **11-a Brazilia Esperantista Junulara Kongreso**, Campina Grande, Brazilo (CP 277, BR-58100 Campina Grande (PB)).
 23-25: **Skipromenado**, Heusy (Verviers), Belgio (M. Grela, Rue de la Colline 16, B-8380 Welkenraedt)

marto

12-majo 11: **Kurso por progresantoj**, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, Box 192, S-691 24 Karlskoga)

aprilo

11-17: **14-a Internacia Junulara Festivalo**, San Giovanni di Valle Aurina, Bolzano, Italio (Itala E-Junularo, via Villorosi 38, I-20143 Milano)
 13-16: **Paska Junulara Renkontiĝo**, Vierhouten, Nederlando (Lilian v.d. Burgt, Postbus 528, NL-6200 AM Maastricht)
 13-20: **6-a Printempa Semajno Internacia**, montara vilaĝo Todtmoos, FR Germanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-str. 2a D-4418 Nordwalde, tel. 2573/626)
 14-17: **45-a SAT-Amikara Kongreso**, Bondy (Parizo), Francio (SAT-Amikaro, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris)
 20-22: **SATEB-Jarkonferenco**, Barlaston, Britio (SAT en Britio, 29 Farrance Road, Romford, Essex RM6 6EB)
 27-04: **Esperanta Semajno pri Sano kaj Resanigo**, Lingfield, Britio (Martin Howard, Webbs Cottage, Woolpits Road, Great Saling, Braintree, Essex CM7 5DZ)

majo

04-07: **74-a Brita Kongreso de Esperanto**, Oksfordo, Britio (K.M. Hall, 37 Granville Court, Oksfordo OX3 0HS)
 18-20: **Sveda Esperanto-Kongreso**, Karlskoga, Svedio (Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm)
 25-30: **3-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto**, Pekino, Ĉinio (Esperanto, Academia Sinica, 52 Sanlihe, CN-100864 Beijing)

junio

01-04: **68-a Germana Esperanto-Kongreso**, Freiburg, FR Germanio (Konrad Gramelspacher, Rimsinger Str. 13, D-7812 Bad Krozingen 4)
 02-08: **42-a IFEF-Kongreso**, Hamar, Norvegio (Karudveien 1, N-2340 Løten)
 18-06: **Somera kursaro**, ŝtata Universitato de Sanfrancisko, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010)
 29-06: **Internacia Esperanto-Semajno**, Nico, Francio (Groupe espérantiste de Nice, "Les Hortensias 2", 121B Bvd. Napoléon III, F-06200 Nice)

julio

7-17: **2-a Junulara Esperanto-Renkontiĝo en Alpoj-Adrio**, Zadar, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb)
 09-14: **Somera kursaro**, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, Box 192, S-691 24 Karlskoga)
 14-21: **75-a Universala Kongreso de Esperanto**, Havano, Kubo (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
 16-23: **40-a KELI-Kongreso**, Neuchâtel, Svislando (Kristana E-ista Ligo Internacia, E. van Dijk-Kuypers, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando)
 21-28: **46-a Internacia Junulara Kongreso**, Playa Girón, Kubo (46-a IJK, Pk. 2018, C-10200 La Habana 2)
 21-28: **24-a ILEI-Konferenco**, Hanabani, Kubo (Malcolm Jones, 41 Causeway, Chippenham, Wiltshire, Britio SN15 3DD)
 24-30: **La Kvinpinta Semajno**, Finnlando (Riitta Pulli, Kulkustie 3 B 14 SF-36240 Kangasala, Finnlando)

aŭgusto

04-11: **63-a SAT-Kongreso**, Linz, Aŭstrio (Max Hollinger, Gruberstr. 65, A-4020 Linz)

Por dekmilo post tri jaroj

Sep mil individuaj membroj. Ridinde, ĉu ne? De jardekoj UEA ne sukcesas preterpasi tiun sorĉitan limon. Sep mil membroj en organizaĵo, kiu pretendas porti la standardon de komunika kaj kultura revolucio por la tuta mondo. Sep mil membroj, kiuj preskaŭ solaj subtenas la agadon de UEA en Azio, en Afriko kaj aliloke, ĝiajn eldonaĵojn, ĝiajn servojn – kvankam tiuj ĉi meritas multe pli da klientoj. Sep mil membroj, kiuj (por diri honeste) ne sufiĉas, eĉ por daŭrigi la nunan nivelon de la agado.

Fronte al la konstantaj deficitaj de la lastaj jaroj, al la kreskantaj atendoj al UEA kaj al la malfermiĝantaj perspektivoj por Esperanto, la Estraro kaj oficejo venis al simpla konstato: Aŭ ni rezignu pri granda parto de nia agado kaj esperoj, aŭ ni trovu pli da subteno en la movado mem. De iuj anguloj venis la konsilo, ke nur la unua alternativo estas realisma. Sed ni ne pretas rezigni tiel facile. En tiu ĉi artikolo ni provos klarigi la motivojn de la membrokampanjo kaj la manierojn, en kiuj ni ĉiuj strebos kontribui al ĝi.

Finon al la malŝparado!

Ĉu malkaŝon de financa skandalo vi atendas legi? Nu, vi certe scias ke la salajroj de la UEA-oficistoj estas ĉiaj ajn krom luksaj. Vi eble malpli konscias, ke UEA elspezas nur kelkajn milojn da guldenoj jare pro siaj eksteraj rilatoj: preskaŭ la tuta buĝeto iras por rekte subteni la movadon. Vi eble ne komparis la prezon de Universala Kongreso kun tiu por similaj nemovadaj aranĝoj, nek faris kiel la Estraro kaj traserĉis ĉiun eron de la buĝeto por eblaj ŝparoj. Vi eble ne plene konstatas la kvanton de nepagata laboro.

Ne, la skandalo ĉe UEA ne koncernas ekcesajn elspezojn. Ĝi koncernas tion, ke el la laborego de oficejo, estraro, komitatanoj kaj delegitoj ne povas profiti miloj da aktivaj movadanoj. Ĉar ili ne membriĝas. Ili ne ricevas la ĉefajn informfontojn pri la movado en monda skalo. Ili ne orientiĝas pri la jam disponeblaj informiloj, la retoj de aktivuloj kaj asocioj, la *eblecoj* de Esperanto. Izolitaj, ili simple ne havas ŝancon agi tiel efike, kiel ili kapablus kiel parto de UEA.

Ĝuste tio estas malŝparo. La Jarlibro kaj revuo *Esperanto* bezonas la saman kvanton da laboro, ĉu temas pri sep mil membroj, ĉu pri dek mil. La servoj de UEA kiel internacia banko, libroservo, revu- kaj inform-peranto jam ekzistas. Nia movado havas potencon organizan rimedon, kiun ĝi apenaŭ utiligas. Se dek mil el ĝiaj anoj eluzus ĝin, tio rezultigus signifan plifortiĝon de la tuta komunumo.

Ĉiu aliĝo kontribuas al la tutmondeco

Pli granda UEA signifas ankaŭ pli reprezentan UEA. Temas unuflanke pri tiuj novaj membroj, kiuj per sia partopreno en la centraj forumoj – en la revuo kaj la kongreso, en la Komitato pere de siaj komitatanoj aŭ rekte ĉe la Estraro – helpas certigi, ke UEA agas por ĉiuj kaj ne nur por movada minoritato.

Sed la dua flanko estas eĉ pli grava. Plimulto de la landoj en la mondo estas tiel malriĉaj, ke iliaj loĝantoj, kiom ajn ili volas, ne povas proprarimede partopreni en la internacia movado. UEA estas la sola movada instanco, kiu de multaj jaroj konsekvence laboras por malfermi al ili ĉiun eblan pordon. Centojn da membriĝoj jare ĝi financas el sia Fondaĵo Canuto. Milojn da libroj ĝi jam ekspedis al la landaj asocioj de la “tria mondo”. Vojaĝojn kaj kongresojn ĝi organizas kaj subvencias, por konstrui ponton inter la kontinentoj. Ĉio ĉi postulas monon – monon, kiun donas niaj membroj el la pli riĉaj mondopartoj. Jam per aliĝo vi subtenas tiun solidarecan agadon. Kaj eblas, kompreneble, aldone kontribui pere de fondaĵo.

Pli forta UEA fortigas ĉiujn aliajn

Frapa karakterizaĵo de la Esperanto-movado estas ĝia diverseco. Ekzistas centoj da organizaĵoj, ĉiu kun la propraj celoj, historio, membraro. Foje oni aŭdas, ke pli granda UEA signifus unukolorigon de tiu bunta panoramo. Male, ni kredas ke pli granda UEA povos multe helpi vivteni kaj funkciigi tiujn pli etajn asociojn, kontribuante al la vigleco kaj vario de la movado.

Tipa faka asocio konstante luktas kun la problemoj de administrado kaj kunordigo. Ofte ĝi tute ne sukcesas realigi ion pri sia propra faktereno. UEA nun ne disponas pri rimedoj por helpi pri tio. Kun pli granda membraro, tamen, kaj kun pli vasta reprezentiĝo inter la fakaj asocioj, UEA povus oferti al ili administrajn kaj kunordigajn servojn, lasante al ili ĝuste la krea laboron. Eĉ sen atendi tion, la oficejo kaj estraro jam nun entreprenas organizi kelkajn renkontiĝojn por stimuli la interŝanĝon de rimedoj kaj spertoj. Ankaŭ por la landaj asocioj, la centraj administraj organoj de UEA povus fari pli – ekzemple sur la tereno de informado – se la organizaĵo havus pli fortan membran kaj fincan bazon.

Ne nur kvanta, sed kvalita salto

Kiel vi scias el ĉi tiu kaj antaŭaj numeroj, UEA havas novan estraron, kiu kunigas kelkajn el la plej aktivaj kaj informitaj movadanoj. Ĝia oficejo de tri jaroj funkcias stabile, en senprecedence

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Josias Barboza. Japanio: Saiki Masayuki. Kanariaj Insuloj: F. J. Dávila Dorta. Nederlando: A. J. Bakker-ten Hagen. Pollando: Teruo Matsumoto.

DONACOJ 1989 (gld.)

ĝis la 31-a de aŭgusto

FONDAĴO AFRIKO: FR Germanio: E. Blasius 217,50. Kanado: D. M. Hawley 179,00. Nederlando: Nederlanda Esperanto-Asocio 100,00; A. J. ten Hagen 1000,00. Svedio: Norrköping Esperanto-Klubo 172,99. Usono: M. Kennedy 24,85. Anonime: 1500,00. Diversaj malgrandaj 9,60. Sumo ĉi-jara: 18 214,66.

FONDAĴO AZIO: Korea Respubliko: D-ro Chang Choong-sik 56,70. Sumo ĉi-jara: 56,70.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S. De Weerd 20,60. Japanio: Shoko Fukui 230,00. Nederlando: Nederlanda Esperanto-Asocio 100,00. Svedio: Esperanto-Klubo Lund 83,75. Anonime: 500,00. Sumo ĉi-jara: 4564,56.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Britujo: M. Boulton 20,00. Kanarioj: INOBO 50,00; M. Pi Maynar 100,00; A. Solis y Pi 100,00. Pollando: B. Grabowski 50,00. Usono: Z. A.

Kruszewski 100,00; R. Goralski Márquez 50,00. Sumo ĉi-jara: 1020,00.

ĜENERALA KASO: Belgio: J. N. de Boé 10,42. Finnlando: A. E. Makkonen 16,59. Svedio: Maja Ahlström 16,75; Margareta Hansson 16,45. Anonime 75,00. Diversaj malgrandaj 1,10. Sumo ĉi-jara: 10 289,27.

ASOCIA KAPITALO: Anonime 1071,00. Sumo ĉi-jara: 1071,00.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Belgio: G. Pirlot 26,76. Anonime 500,00. Sumo ĉi-jara: 817,42.

FONDAĴO TEJO: Luksemburgio: Claude Nourmont 84,97. Anonime 33,10. Sumo ĉi-jara: 136,05.

FONDAĴO WÜSTER: Anonime 1681,13. Sumo ĉi-jara: 8927,14.

ĈINIO: Nederlando: J. O. de Kat (ANSE) 82,66. Sumo ĉi-jara: 1077,66.

ESPERANTO-CENTRO BIAÆYSTOK:

Finnlando: E. Martin 50,30. Italio: Trenta Esperanto-Asocio 150,00. Nederlando: F. Zeiler 75,00. Sumo ĉi-jara: 848,20.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

bona etoso. Pluraj komitatanoj jam laboras entuziasme kaj efike tra la tuta jaro, kaj la nova estraro klopodos stimuli aliajn sekvi tiun ekzemplon. Aro da novaj komisiitoj baldaŭ eklaboros, ĉi-foje en pli proksima kunlaboro kun la estraro. Per la aliĝo en 1989 de kvin pliaj landaj asocioj, UEA fariĝis pli reprezenta ol iam ajn antaŭe. Ankaŭ TEJO restarigis sin kaj entreprenas novan agadon inter la junularo en kaj ekster Eŭropo.

Se ĉi tiun laboron ne apogos la movado kiel tuto, ĝi riskos estingiĝi kiel kandelflamo en vento. Sed ni kredas je la komuna volo de la esperantistaro. Vidante ke la organoj kaj programoj de UEA kaj TEJO kontribuas al nia komuna afero, stimulas kunlaboron, respondas al la deziroj kaj bezonoj de la movadanoj, tiuj ĉi volonte donos sian subtenon. La revuo do provos, pli konsekvence ol antaŭe, bildigi la agadon de UEA kaj varbi vian apartenon.

Ni ĉiuj estas ambasadoroj

La estraranoj kaj oficistoj jam konsideras sin ambasadoroj por UEA. Al la landaj kaj fakaj revuoj kaj kongresoj ili portas la saluton kaj alvokon de la Asocio: kunigu niajn fortojn por helpo unu al la alia. Laŭeble ili entreprenos konkretajn paŝojn al tiu celo. Sed solaj ili ne povos sukcesi.

Se vi konsentas, ke UEA – malgraŭ fojaj mankoj kaj eraroj, kiajn faras ĉiu homa entrepreno – prezentas la solan eblan forumon por la kunlaboro de ĉiuj esperantistoj, aliĝu kaj kunagu kun ni. Proponu al viaj amikoj kaj kolegoj fari same. De la oficejo vi povas senpage havigi varbilojn kaj informilojn. El la revuo vi ekscios pri la evoluo de la kampanjo, kaj pri novaj iniciatoj sur plej diversaj terenoj. Donacu unujaran membrecon, eble al amiko en alia lando. Proponu vian helpon al viaj komitatanoj aŭ al via ĉefdelegito. Kunvoku kunvenon de la lokaj kluboj pri la rilatoj kun UEA kaj tio, kion oni subtenas per membriĝo en ĝi. Invitu estraranon aŭ alian reprezentanton de UEA alparoli la kunvenon. Informiĝu mem pli bone pri la strukturo, historio kaj agado de nia monda asocio.

Por la kampanjo ni fiksas la celon: allogi ĉiujare mil pliajn aktivulojn al konstanta subteno de UEA, ĝis fine de 1992 ni havos membraron de pli ol dek mil. Tio estas certe atingebla, eĉ preterpasebla. Dume ni laboros por fari la Asocion pli utila, pli malfermita kaj pli efika. Ni celas meriti tiun aldonan subtenon – kaj ankaŭ daŭrigon de la via, kiu ja restos nemalhavebla.

Mark Fettes

KOTIZTABELO DE UEA POR 1990

Lando/valuto	MG	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/guldeno	7	17	42	25	13	84
Aŭstralio/dolaro	9	21	52	31	16	104
Aŭstrio/ŝilingo	75	185	465	280	140	930
Belgio/franko	225	560	1400	840	420	2800
Brazilo/guldeno	7	17	42	25	13	84
Britio/pundo	4	9	22	13	7	44
Bulgario/guldeno	9	21	52	31	16	104
Ĉeĥoslovakio/krono	45	110	275	165	85	550
Danlando/krono	45	110	265	155	80	530
Finnlando/marko	27	65	165	100	50	330
Francio/franko	40	90	225	135	70	450
FR Germanio/marko	12	29	72	43	22	144
Germana DR/guldeno	11	27	66	39	20	132
Greklando/draĥmo	590	1480	3700	2220	1110	7400
Hinda Unio/rupio	32	80	200	120	60	400
Hispanio/peseto	550	1380	3450	2070	1040	6900
Hungario/forinto	225	560	1400	840	420	2800
Irlando/pundo	4	8	20	12	6	40
Islando/guldeno	13	31	77	46	23	154
Israelo/guldeno	10	25	63	38	19	126
Italio/liro	7500	18 500	46 000	27 500	14 000	92 000
Japanio/eno	960	2400	6000	3600	1800	12 000
Jugoslavio/guldeno	7	17	42	25	13	84
Kanado/dolaro	8	18	45	27	14	90
Korea Resp./guldeno	10	25	63	38	19	126
Nederlando/guldeno	13	31	77	48,75*	24,40*	154
Norvegio/krono	40	100	250	150	75	500
Nov-Zelando/dolaro	11	26	65	39	20	130
Pollando/guldeno	7	17	42	25	13	84
Portugalio/eskudo	590	1480	3700	2220	1110	7400
Soveta Unio/guldeno	10	23	59	36	18	118
Sud-Afriko/guldeno	12	29	72	43	22	144
Svedio/krono	40	100	250	150	75	500
Svislando/franko	11	27	66	39	20	132
Usono/dolaro	7	16	39	23	12	78
TARIFO A / guldeno	8	20	50	30	15	100
TARIFO B / guldeno	7	17	42	25	13	84

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Kuvajto, Malto, Singapuro.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.)

*inkluzivas la enlandan imposton de 6%.

- MG:** Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
MJ(-K): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)
MA(-K): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-K) plus la revuo *Esperanto*
DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*.
SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO
SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)
PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-K) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz), 31.01m (9675 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 31.50m (9525 kHz), 25.34m (11840 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.75m (11650 kHz), 19.78m (15165 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 25.39m (11815 kHz).

17.30-18.00 Varsovio, 48.90m (6135 kHz), 41.18m (7285 kHz), 31.45m (9540 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 30.10m (9965 kHz), 19.78m (15165 kHz).

20.30-20.55 Varsovio, 42.11m (7125 kHz), 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.27m (7270 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

13.30-13.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

22.00-22.30 Vilnius, 40.54m (7400 kHz), 25.45m (11790 kHz), 21.99m (13645 kHz), 19.76m (15180 kHz), 19.41m (15455 kHz). Nur kvar minutojn (ĝis nun la finajn) kadre de anglalingva elsendo. Litova Radio, Esperanto-fako, SU-232674 Vilnius, Litovio, Sovetunio.

MERKREDE

01.15-01.25 Berno, 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 16.92m (17730 kHz).

03.15-03.25 Berno, 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 21.92m (13685 kHz), 16.98m (17670 kHz), 13.83m (21695 kHz).

10.45-10.55 Berno, 22.00m (13635 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).

13.15-13.25 Berno, 31.19m (6920 kHz), 25.65m (11695 kHz), 22.00m (13635 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).

15.15-15.25 Berno, 21.92m (13685 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.87m (21630 kHz).

17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.44m (15430 kHz), 19.32m (15525 kHz), 16.83m (17830 kHz).

22.15-22.25 Berno, 30.58m (9810 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.27m (15570 kHz).

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), kaj FM 103.8 MHz. Radio-vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

13.30-13.45 Berno, kiel lunde.

21.20-21.30 Tallinn, 290m (1035 kHz), 50.63m (5925 kHz). Nur la unuan kaj trian ĵaŭdojn de la monato. Eesti Raadio, Esperanto-fako, SU-200100 Tallinn, Estonio, Sovetunio.

21.30-22.00 Vilnius, 451m (666 kHz), 49.18m (6100 kHz). Kvar minutojn, kiel lunde.

SABATE

13.30-13.45 Berno, kiel lunde.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Okfoje Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

08.00-08.20 Havano, 25.35m (11835 kHz). Radio Habana Cuba, Esperanto-sekcio, Apartado 70-26, La Habana, Kubo.

04.05-04.30 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.60m (15410 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.50-10.00 Budapeŝto, FM 67.05 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio

Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

09.20-09.30 Tallinn, laŭ la antaŭa ĵaŭdo.
13.05-13.30 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 21.85m (13730 kHz), 19.44m (15430 kHz), 13.96m (21490 kHz).

17.00-17.30 Havano, 25.59m (11725 kHz), 25.51m (11760 kHz), 25.38m (11820 kHz), 19.80m (15155 kHz), 19.63m (15285 kHz), 19.56m (15340 kHz).

18.30-19.00 Havano, 25.42m (11800 kHz), 19.63m (15285 kHz), 16.85m (17800 kHz).

20.00-20.10 Vatikano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj FM 93.3 MHz, 96.3 MHz, 105.0 MHz (ankaŭ je festotagoj).

22.00-22.20 Havano, 19.63m (15285 kHz), 16.85m (17800 kHz).

22.40-23.00 Havano, 50.13m (5984 kHz), 25.19m (11910 kHz), 25.10m (11950 kHz), 25.06m (11970 kHz).

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

DIREKTITAJ ONDOJ

Berno: je la 01.15h al Centra Ameriko kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15 al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45h kaj 10.45h al Malproksima Oriento kaj Pacifiko; je la 13.15h al Proksima Oriento kaj Azio; je la 15.15h al Proksima Oriento kaj Orienta Afriko; je la 17.15h al tuta Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **Havano**: je la 08.00h al Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio; je la 18.30h kaj 22.00h al Eŭropo kaj la Mediteranea regiono. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 1530, 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 20.00h al Afriko. **Vieno**: 15410 kHz al Proksima Oriento; 15430 kHz al Malproksima Oriento; 21490 kHz al Okcidenta Afriko.

ALIAJ STACIOJ

(regiona aŭdebleco; horoj laŭ loka tempo) **Brazilo**: Sorocaba (ZYK669), 1080 kHz, sabate, 20.00-21.00h; **Rio de Janeiro** (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 10.30-10.45h (Brazila Spiritisma Federacio).

Eldonisto serĉata por la kultura revuo *Survoje*. Jam pretas materialo por ses numeroj, sed ni perdis la eblon aperigi ĝin per propraj fortoj. Kontaktu J. Muraŝkovskij, Komjaunatnes 34-68, SU-229600 Jelgava, Latv. PSR, Sovetunio.

La ĝenerala sekretario de ILEI, Audrey Childs-Mee, estas malsana. Urĝajn korespondaĵojn bonvolu sendi al la vic-sekretario: Malcolm Jones, 41 Causeway, Chippenham, Wiltshire, Britio SN15 3DD.

Instruistino de la latina lingvo (35 jar.), interesiĝas pri Agni-jogo, ŝakludo, gimnastiko, opero, muziko, arto, lingvoj, NIFoj. Galina Kijas, Tomsk E-klubo, a/k 261, SU-634041 Tomsk, Sovetunio.

Bonvolu gratuli al Robert Penny, 2 St. Botolphs Lane, Bury St. Edmunds Britujo IP33 2BE, pro lia 80-a naskiĝtago 22 decembro 1989, kaj 60-a datreveno de esperantistiĝo.

Ĉu vi volus instigi min al korespondado? S-ino Elizabeta Frudko, Pana Tadeusza 15m 69, PL-10-461 Olsztyn, Pollando.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondakuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Dank' al la subteno de ILEI kaj de s-roj L. Lentaigne, G. Pirlot, E. Symoens kaj Hou Zhiping, mi kompilis kaj eldonis la libron pri Esperanto-eduko titole *La situacio de E-instruado en superaj lernejoj*. La libro resumas la skizon de E-instruado en 174 superaj lernejoj de 32 landoj kaj enhavas la adreson de 180 kursgvidantoj. Vi povas ricevi ĝin nur kontraŭ sendkosto, 4 irk aŭ 3 gld., ĉe s-ro Wang Xigen, Anhui, Shitai-xian, Ren-shi-ju, CN-245100, Ĉinio.

Korespondemuloj 10- ĝis 75-jaraj serĉas kolektivajn kaj individuan kontakton tutmonde: Esperanto-klubo, BG-5180 Polski Trambes, Bulgario.

Dank' al donaco de la komisiito de KSM (4000 FF.) la Koresponda Servo de UEA nun posedas pli valoran komputilon Atari 1040, kiu permesas enlistigi en la saman programon plurajn milojn da alskribintoj. Ni atendas amason da aliĝoj! KSM, "Les Hortensias 2", 121 bis, Boul. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

19-jara brazila komencanto deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Inácia Silva de Andrade, Rua Olinda Ellis n-ro 84, Apt. 102, Campo Grande (RJ), 23050 Brazilo.

Ŭusink-Nagata (Evert kaj Akiko) havas novan adreson: Plantsoen 126, NL-6701 AT Wageningen, Nederlando (telefono: 08370-24366).

La Kristana Scienco. Dez. kontakti aliajn, kiuj sekvas tiun religian vivmanieron, aŭ interesiĝas; E-informilo havebla (du irk-oj, se eble). H. Tharme, 22, Belmont Ave., Bangor, Gwynedd, Britujo, LL57 2HT.

Korespondemulo. Poŝtkesto 2685, 80.001 Curitiba, Brazilo.

Bulgara Esperantisto


organo de BEA

Riĉa primovada kaj kultura enhavo, tribuno de diversaj opinioj, moderna ilustrita aspekto, ĉiumonate 32 paĝoj.

Serĉataj perantoj eksterlande, rabato 25%.

Jarabono ĉe UEA: 32 gld.

Adreso: BEA, p.k. 66, BG-1000 Sofio, Bulgario



en la mondo

Jen precize, KIE en la mondo eblas kandidatiĝi por la elementa aŭ meza ekzamenoj de UEA/ILEI. En Kultura Centro Esperantista (pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds), jan. 3-4 kaj apr. 19-20, 1990. Prepara kurso ne-intensiva ekde dec. 26, 1989 kaj intensiva ekde apr. 16. Julie en la universitato de San Francisko kaj la UK.

Pretiĝu per la 36-paĝa gvidilo *Internaciaj ekzamenoj de UEA-ILEI*, kiu prezentas i.a. specimenajn testojn. Prezo ĉe UEA: 6,60 gld.; ĉe FEL 120 BEF; ĉe EAB £1,80; ĉe KCE 5 SFR; ĉe IEF 4500 liroj.

KURSO PRI FAKA TRADUKADO

KCE kaj DLT okazigas kurson pri faka tradukado. La komputila traduksistemo DLT, evoluigata ĉe BSO/Research en Nederlando, bezonos ampleksan kolekton da fakaj tekstoj en etna lingvo paralele kun altnivela traduko al Esperanto. El tiaj specimenaj tradukoj la komputila sistemo derivos la scion, necesan por traduki aŭtomate. Lige al tiu bezono DLT deziras sproni la kapablon profesinivele traduki al kaj el Esperanto. La kurso traktos senkomputilan, percerban, surpaperan tradukadon de nebeletraj tekstoj.

Datoj: 18/21-1-1990. **Loko:** La Chaux-de-Fonds, Svislando. Kotizo (instruado, loĝigo, manĝoj): 220,- / 180,- / 150,- svisaj frankoj laŭ ĉambrokategorioj. Informoj kaj aliĝoj:

Kultura Centro Esperantista
Pf. 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Svislando
telefono: 41 / 39 / 26 74 07

Tiu estas la filozofia bazo por vera perestrojka.

Bruno Vogelmann

LA NOVA REALISMO

Bruno Vogelmann, naskita 1909 en urbo Heilbronn en Suda Germanio, edukita de pia patrino, gimnazio, 18jara fariĝis junkomunisto, laboristo, studanto de pedagogio, instruisto, 1933 arestita kaj turmentita, poste aktiva en antifaŝista rezistmovado, longjare en malliberejo kaj koncentrejo, post la milito multspece laboranta en ekonomio kaj kulturo, eĉ 80jara aktiva en publika vivo, aŭtoro kaj membro de la Urba Konsilantaro. Li montras jenajn temojn:

1. La Nova Pensado kun la 5 principoj
2. La danĝereco de ĉiuj dogmoj kaj ideologioj
3. La esenca unueco de serioza ateismo kaj serioza religio
4. La paraleleco de la sciencaj/ateistaj kaj de la religiaj nocioj, moroj kaj kutimoj
5. La senceco de ĉiu vivo, la celstrebado de la vivo

UNUAJ PRIJUĜOJ

Dr. André Albault, universitato Toulouse, Francio, prezidanto de la Akademio de Esperanto:

„... via libro kaj Esperanto valoras tiun penon! Via libro pro la esprimitaj ideoj; Esperanto pro la formoj uzitaj en la esprimado.”

Robert Jungk, mondkonata futurologo kaj pacbatalanto, Salzburg, Aŭstrio:

„Tio estas la mondkoncepto de la estonteco.”

Prof. Dr. F.A. Pennacchietti, universitato Torino, Italio:

„Mi opinias, ke estas tempo, ke la germana pensado donu ion pozitivan al la mondo. Fakte la ora sezono de la germana pensado, nome la klasika germana filozofio de la pasinta jarcento estis nur la radiko de ĉiuj katastrofoj, kiujn suferis Eŭropo en la nuna jarcento, ... de la plej fiaskaj kaj abomenaj ideologioj, kiujn konis la homhistorio.”

„Jes, la persona, intima konscio, ke ĉio, kio okazas ĉirkaŭ, en kaj preter ni estas sencohava, kaj ke la homo ne estas memcela, tio estas komuna riĉaĵo de serioza kredanto kaj de serioza ateisto.”

Prof. Dr. Rupert Riedl, universitato de Vieno, Aŭstrio,
kunfondinto de la Scienco de Kognoevoluo:

„Mi legis multe en via libro kaj ĝojas ĉiam denove pri la evoluo de viaj ideoj... tiu libro estas utila por nia tempo.”

Bruno Vogelmann: **LA NOVA REALISMO**, 186 paĝoj, prezo 498,— BEF, 27 gld. ĉe UEA
(Esperanto: ISBN 90-71205-29-0 – Deutsch: ISBN 3-26850-007-2)

Havebla en ĉiuj librejoj. Mendantoj el nepagipovaj landoj kontaktu rekte la eldonejon:
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.